



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Marto 2016 n-ro: 3



Malnovaj numeroj ĉe:
<https://esperantoturkiye.wordpress.com/category/dergi-revuetto/>

Konatiĝu kun turkaj esperantistoj ĉe:
<https://web.facebook.com/groups/7121509722/>

Kontakt adreso:
vasilkadifeli@gmail.com

Saluton!

Ni jam eldonis la trian numeron de nia revueto kaj preskaŭ jam triono de la novjaro elĉerpiĝis.

Eldoni revueton eĉ simplan kiel ĉi tiun ne estas facila afero. Ekzemple ni tute forgesis meti enhavliston en ĝi. En la komenco tio ne estis grava sed ĝi ankaŭ helpas la redaktacion por ne aperigi la saman verkon dufoje en diversaj numeroj. Do, en ĉi tiu numero ni metis enhavtabelon en la dekstra kolumno kaj venontfoje ni trovos pli bonan lokon por ĝi.

Ni ĉefe volas atentigi vin pri la artikolo de kara Renato Corsetti, ĝi estas tre interesa.

Bonvolu ne forgesi skribi al ni.

Bonan legadon al ĉiuj! ■

Merhaba!

Dergimizin üçüncü sayısını yayınladık bile ve yılın üçte birini de yaklaşık olarak bitirdik.

Elinizdeki bu basit dergi gibi bir dergiyi bile yayınlamak o kadar kolay bir şey değil. Örnek "içindekiler" listesini koymayı unutmuşuz. Başlangıçta önemli olmasa da editörlere aynı makaleyi iki kez yayınlamamaya yardımcı olan bir şey. Dolayısı ile bu sayıda sağ sütuna içindekiler tablosu ekledik ve gelecek sefer de daha iyi bir yer bulmaya çalışacağız.

Bu sayıda dikkatlerinizi özellikle değerli Renato Corsetti'nin enteresan yazısına çekmek isteriz.

Lütfen bize yazmayı unutmayın.

Hepinize iyi okumalar! ■

ENHAVTABELO

Saluton!	1
Kursoj	2
Nia nova retpaĝo	2
Nova Blogo en gazeto Milliyet	2
Esperanto-Sumoo	3
UEA novaĵoj	3
TEJO novaĵoj	3
Gasto-verkisto de la monato	4
Balkana Renokontiĝo en Razgrad	5
Int.Tago de la Gepatra Lingvo	6
Portreto - Hori Jasuo	9
D-ro Barış rekomendas	10
El la kajero de Lisa Golomb	10
Leteroj de legantoj	11
Libro Kritiko	12
Mia Kato Mortis	12
Legajo - Lernu fremdajn lingvojn	13
Legajo - La Unua Puto	15
Mallonga Historio de Filozofio (2)	16
Nazim Hikmet kaj Liaj Poemoj	16
La 9a Mezorianta Kunveno	17
Kio estas TEJO	18
Krucvort-enigma (facila)	18
Krucvort-enigma (malfacila)	19
Poemo	19
Ŝercoj!	19
Nova projekto ĉe edukado.net	20
Esperanto Kurso 3	21
Malfermo	24
ALDONAĴO - Umberto Eco	25



TURKA STELO


Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Kursoj



1) Kurso por komencantoj en Kadıköy distrikto kiun gvidas Murat Özdizdar kaj Vasil Kadifeli.

2) Kurso por komencantoj en la lernejo Üsküdar Amerikan Lisesi en Istanbulo kiun gvidas Murat Özdizdar.

3) Kurso por komencantoj en Celal Bayar Universitato en Manisa urbo kiun gvidas Utku Gürdal.

Ĉiuj kursoj en la fino de januaro paŭzis pro la ekzamenoj en universitato, kaj pro la interjaraj ferioj de la mez-lernejoj. Ni esperas ke post la 15-a de februaro ĉiuj kursoj revigliĝos. ■

Nia nova retpaĝo



La turka esperantistaro nun havas novan retpaĝon!

En la retpaĝo ni aperigas mallongajn dulingvajn blogaĵojn kaj la ĉefa celo estas allogi la turkajn neesperantistojn kaj afiŝi informojn pri Esperanto por ĉiuj. En la retpaĝo ankaŭ troviĝas ligiloj al la malnovaj numeroj de nia revueto "Turka Stelo". Iru sub menuo "Dergi/Revueto" por elŝuti ilin. ■


<https://esperantoturkiye.wordpress.com>

Nova blogo en gazeto Milliyet



Finfine nia blogo pri Esperanto en la ĵurnalo Milliyet estis aprobita. Ni atendis preskaŭ ses monatoj por tio. Milliyet estas ambaŭ papera kaj reta ĵurnalo, kaj havas grandan kaj gravan blogon, kiu estas malfermita al tiuj, kiuj volas aperigi siajn verkojn. Tamen la funkciado kaj la kreo de blogaĵo ne estas tiel facila kiel tiu en la blogo de la ĵurnalo Radikal.

La ligilo de nia nova blogo en ĵurnalo Milliyet estas : <http://blog.milliyet.com.tr/esperanto>



Radikal antaŭ unu jaro estis ambaŭ papera kaj reta ĵurnalo sed nun ĝi estas nur reta ĵurnalo. Nia malnova blogo en ĉi tiu ĵurnalo jam havas 15 artikolojn kaj ilin jam legis pli ol 5,500 homoj.

La ligilo al nia blogo en ĵurnalo Radikal estas : <http://blog.radikal.com.tr/Bloglar/esperanto>

En Turkujo nur tiuj du ĵurnaloj havas Blogojn kiujn povas uzi la legantoj. ■

Ni atendas leterojn de niaj legantoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

Esperanto-Sumoo



Rezulto de la novembra Esperanto-Sumoo

En la novembra Esperanto-Sumoo

partoprenis 275 legantoj el 29 landoj. Perfektaj venkintoj (15 venkoj) estis 2,138/277 (85,92%). Kvanto de legitaj paĝoj estis pli ol 20,000 paĝoj. Do, averaĝe unu homo legas 70 paĝojn dum 15 tagoj de la Sumoo.

La nombro de la partoprenantoj estis la plej granda en nia historio dank'al

1. grupa partopreno de koreanoj (51 homoj)
2. grupa partopreno de nepalanoj (13 homoj)
3. propagandoj en diversaj E-aranĝoj kaj landoj.

El Turkujo partoprenis kvar legantoj (Fatih Emre Can, Mehmet Fatih Yüce, Konuralp Sunal, Vasil Kadifeli) kaj tri el ili venkis ĉiuj 15 tagoj kaj gajnis diplomon.

La plej bedaŭrindaj aferoj estis, ke neniu partoprenis el Afriko kaj Oceanio. El Oceanio neniu partoprenis ekde la komenco de la Sumoo.

Venis 19 recenzoj aŭ komentoj pri legitaj libroj kiujn ni aperigos en nia retejo :

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>

Nia facebook grupo "Esperanto-Sumoo" estas ĉe:

<https://web.facebook.com/profile.php?id=759066970888217>

La marta sumoo okzos ekde la 13a ĝis la 27a de marto dum 15 tagoj.

Ne forgesu aliĝi! ■

UEA



N-ro 420 (2016-01-15)

El Popola Ĉinio serĉas fremdlandan esperantistan redaktoron

El Popola Ĉinio, kiu sendas informojn pri Ĉinio, sed ankaŭ pri la Esperanto-movado, serĉas fremdlandan esperantistan redaktoron, kiu respondecos pri instruado de Esperanto en lernejoj kaj pri verkado kaj korektado de artikoloj por la retejo.

Kontaktinformoj:

13693326472@163.com. Pli da detaloj ĉe:

http://www.espero.com.cn/2016-01/08/content_37495493.htm.

N-ro 420 (2016-01-15)

AMO 17: Kiel rejunigi la komunumon?

Jarŝanĝe en Eger, nordorienta Hungario, okazis kadre de la 7-a Junulara Esperanto-Semajno la 17-a Seminario pri Aktivula Maturigo (SPAMO), dediĉita al la temo "Rejunigi la komunumon". Prepare al la seminario aperis en la novembra numero de la revuo Esperanto artikolo pri la aĝdistribuo de la membraro de UEA: Plej frapa estas la statistiko, ke homoj pli ol 83-jaraĝaj konsistigas same grandan parton de la membraro kiel membroj en TEJO-aĝo. Dum kvar antaŭtagmezoj 17 seminarioj el 13 landoj dediĉis sin al la trovado de solvoj por la minaca "aĝproblemo".

<http://uea.org/aktuale/komunikoj>

TEJO



N-ro 420 (2016-01-15)

TEJO havas duan oficiston

Post la dungo de Mounir Abjiou kiel plentempa oficisto de TEJO, pasintsemajne eklaboris la dua (duontempa) oficisto, Uriel Gurdíán. 27-jaraĝa esperantisto el Nikaragvo. Gurdíán estas aktiva en la amerika movado kiel membro-kunordiganto, krome li rolis kiel organizanto de eventoj. Li helpas la Estraron kaj la jaman oficiston pri la kutimaj oficistaj taskoj. Gurdíán estis elektita de la estraro, post kiam en Komitata voĉdono ĉiu el la finaj du kandidatoj ricevis saman kvanton da jesaj voĉoj. La dungo de du oficistoj efektiviĝis danke al administra subvencio de Eŭropa Unio.

N-ro 420 (2016-01-15)

TEJO serĉas EVS-volontulon!

Kadre de la Eŭropa Volontula Servo, TEJO invitas vin iĝi plentempa TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo. Volontulante vi havos ŝancon ne nur signife kontribui al la bonfarto de nia organizaĵo, sed ankaŭ persone pliriĉiĝi. EVS estas malferma al ĉiuj junuloj inter 18 kaj 30-jaraĝaj loĝantoj en Eŭropa Unio aŭ eventuale en najbaraj landoj. Se vi interesiĝas pri la ebleco kaj ŝatus ekscii pli pri la taskaro de volontulo kaj pri pliaj detaloj, bonvolu informiĝi ĉe: <http://tejo.org/2015/12/tejo-sercas-evs-volontulon/>.

<http://uea.org/aktuale/tejo>
<http://tejo.org/>



KIEL EUROPAŬOJ, NE ESTANTE TURKOJ, NE KOMPRENAS LA STRUKTURON DE ESPERANTO.

Antaŭ kelkaj jaroj mi prelegis en francaj Esperanto-kluboj en la kadro de tiuj preleg-rondiroj de eksterlandanoj, kiujn ili regule aranĝas.

Mi kutime demandis la homojn en la komenco: Ĉu Esperanto estas pli simila al la franca aŭ al la turka? La ĥora respondo estis "Al la franca!" Kaj tiam la prelego konsistis el la provo konvinki ilin, ke Esperanto estas pli simila al la turka, kion mi sincere kredas. Mi nur povas ĉi tie mallonge resumi kelkajn punktojn.

1. Esperanto naskiĝis en Eŭropo, sed Zamenhof ne volis ĝin lingve hind-eŭropa. Li skribis:

"Mi aranĝis plenan dismembriĝon de la ideoj en memstarajn vortojn.....[ekzemplo: frat-in-o]... Sed ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la eŭropaj popoloj kaj al kutimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial mi tute alikonformigis tiun ĉi dismembriĝon de la lingvo al la spirito de la lingvoj eŭropaj, tiel ke se iu lernas mian lingvon laŭ lernolibro, ne traleginte antaŭe la antaŭparolon (kiu por la lernanto estas tute senbezona), - li eĉ ne supozas, ke la konstruo de tiu ĉi lingvo per io diferencas de la konstruo de lia patra lingvo." [Zamenhof, *Unua libro de la lingvo Esperanto en Fundamenta Krestomatio*, 12-a eldono, paĝo 248]

2. Estas vero ke la vortaro de Esperanto estas preskaŭ tute el eŭropaj lingvoj. Sed en lingvoj strukturo estas pli fundamenta ol vortoj. Se mi skribas "la kitabo kanas kabira", tio ankoraŭ estas Esperanto. Sed, se mi skribas "la kitabo kabira" [por "la libro estas granda"], tio ne plu estas Esperanto.

Poste, kompreneble, mi montris en Francujo la turkajn vortojn:

Çin = Ĉinujo, Futbol = piedpilko, Jandarma = polico, Kuaför = frizisto, Şans = ŝanco, Asansör = lifto.

Mi volis substreki ke en Esperanto kaj en la turka oni skribas kiel oni parolas. La miro estis ĝenerale granda. Rigardu tiujn strangulojn kun regulaj alfabetoj!

Poste mi montris tre simplajn regulojn de la turka por montri ke la turka gramatiko konsistas el reguloj por kunmeti vortpecetojn, precize kiel en Esperanto:

Ev = domo, Evler = domoj, Evi = la domo, Evde = en la domo, Eve = al la domo, Evden = de la domo

Kaj de la verbosistemo:

Iç = trink-

Iç-iyor-um = trink-nun-as-mi = Mi trinkas

Gel = ir-

Gel-m-iyor-um = ir-ne-nun-as-mi = Mi ne iras

Gel-dim = ir-is-mi = mi iris

Gel-me-dim = ir-ne-is-mi = Mi ne iris

Gel-dim mi? = ir-is-mi ĉu? = Ĉu mi iris?

Kaj de kunmetitaj vortoj kiel en Esperanto:

Pizza evi = Pico-domo

Yatak odasi = dormo-ĉambro

Hastane = malsanul-domo

Hastane bilişim sistemi = malsanulejo-inform-sistemo

Mi devas diri, ke malmultajn mi konvinkis. Eble turkaj esperantistoj povus konvinkiĝi, se ili pripensas la aferon. ■

Renato Corsetti

10-12 junio 2016 - Balkana Renkontiĝo en Razgrad



ESPERANTISTA DOMO PRI KULTURO "D-RO IVAN KIRĈEV" KAJ
ESPERANTO-SOCIETO "D-RO L.L. ZAMENHOF" RAZGRAD plej
afable invitas Vin partopreni BALKANAN ESPERANTISTAN
RENKONTIĜON, kiu okazos kadre de nia ĉiujara tradicia festo EKRA
- Internacia Krea Renkontiĝo "Abitus" la 10an-12an de junio 2016

PROGRAMO

10.06.2016 (VENDREDE)

08:00-17:00 Akceptado de la gastoj en Esperantista domo kaj ilia loĝigo en hotelo "Central"

15:00-17:00 Ekskurso- konatiĝo kun la vidindaĵoj de nia urbo

17:00-18:30 Prezento de la plej nova poezia libro „Vaganto inter la steloj“ de la bulgara eminenta poeto, verkisto, ĵurnalisto, tradukisto kaj esperantisto Venelin Mitev en la Artgalerio „Ilija Petrov“

19:00 Interkona vespero en restoracio

11.06.2016 (SABATE)

10:00-13:00 En hotelo "Central"

- Konferenco "Disvolviĝo kaj pureco de la Internacia lingvo Esperanto"

Ĉefpreleganto: inĝ. Nikola Uzunov Kunprelegantoj: Georgi Mihalkov, Eva Bojaĝieva kaj Josip Pleadin

- Kafopaŭzo. Komuna foto

- Traktaĵoj de partoprenontoj

13:00-16:00 Tagmanĝo, ripozo, libera tempo

16:00-18:00 En la salono de la Filharmonio

- Solenaĵo - Anonco de la rezultoj de la Internacia literatura konkurso EKRA-2016

- Koncerto

19.00 Amuza vespero en restoracio

12.06.2016 (DIMANĈE)

09.00 Ekskurso al la Arkeologia rezervejo Sborjanovo kun traciaj tombodomoj sub aŭspicio de UNESKO.

Tranoktado en hotelo "Central"- 18 € unu nokto en dulita ĉambro

Vespermanĝo- vendrede- 10 € en restoracio; sabate-15 €.

Partoprenkotizo: 5 €;

Ekskurso: 10€

Bonvolu vi sendu la monon al la konto: RaiffeisenBANK BIC:RZBBBGSF; BG64RZBB9155 1002672691

SEDK "D-ro Ivan Kirĉev" post kio, vi nepre konfirmu la sendon per letero al la subaj retadreso: Vi skribu vian nomon, landon, retadreson, kiom da tranoktoj kaj vespermanĝoj vi pagas.



Limdato 30.04.2016

Post la ricevo de la pago kaj via letero ni konfirmos tion.

Por demandoj kaj informoj:

GSM: 0899 507 631; 0897 093 771 ; 0878 507 633 ; 084 63 46 39-

D. Kateva 0896 384789- Ivanichka Magharova

Retadreso: dkateva@mail.bg ; ivesper_ho@abv.bg ;

esperanto_razgrad@mail.bg

Internacia Tago de la Gepatra Lingvo

La 21-an de februaro 1952 la polico pafmortigis en la universitato de Dako, en Bangladeŝo plurajn manifestaciantajn studentojn. Tiuj studentoj manifestaciis por ke oni agnosku la ekziston de ilia gepatra lingvo, la bengala, kiun oni volis forigi de la universitato favore al lingvo «pli granda», parolata de la fortuloj de tiu momento.

Temas pri io, kio ripetiĝas, en diversaj formoj, daŭre tra la tuta mondo kaj tra la tuta historio. Ne nur en Banglujo, sed ankaŭ en pluraj eŭropaj landoj, kiel ekzemple en Nederlando, kie la registaro en 2015 aprobis planojn por laŭgrada forigo de la pozicio de la angla lingvo en la instruado - malfavore al la lokaj gepatraj lingvoj.

Tiuj ne estis unikaj okazaĵoj. Kaj en Banglujo kaj en Nederlando temas pri la sama logiko: «mi estas la fortulo, vi silentu kaj eventuale, se vi volas paroli, vi parolu mian lingvon». Aliflanke kiel ĉiuj lingvistoj diras al ni (ni citas unu el ili, Ken Hale): «Kiam lingvo mortas, ni perdas grandan intelektan riĉecon, kvazaŭ oni faligis bombon sur la muzeon Louvre.»

Krom la socia maljusteco, kiu okazas kiam ies gepatra lingvo estas malrespektata, necesas konscii pri la fakto, ke biologia kaj lingva diversecoj estas nedisigeblaj, interkonektitaj kaj unu de la alia dependantaj. El perdo de lingva diverseco rezultas perdo de tradiciaj konoj esence necesaj por daŭripova biodiverseco, por la vivo. (Fina deklaro, 64a UN-NRO-konferenco, Bonn, 2011 ¹ kaj Terralingua ²)

La 17-an de novembro 1999 Unesko proklamis la 21-an de februaro la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo. En 2007 ankaŭ la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj ³ alvokis la membroŝtatojn por «Antaŭenpuŝi la konservadon kaj protektadon de ĉiuj lingvoj uzataj de la popoloj de la mondo.», samtempe deklarante la jaron 2008 Internacia Jaro de Lingvoj. En 2014 Unesko aperigis en sia retejo ankaŭ Esperanto-lingvan version de la mesaĝo de la Ĝenerala Direktoro, Irina Bokova ⁴.

Kiel rilatas al ĉio ĉi Esperanto? La du aferoj ja rilatas inter si, ĉar la kernaj valoroj de ĉi tiu tago, la multilingveco kaj la rajto de ĉiu homo paroli sian gepatran lingvon, estas ankaŭ la valoroj kiujn la movado por Esperanto defendas. Ni, la esperantistoj,

Uluslararası Ana Dili Günü

21 Ŝubat 1952 günü Bengladeŝ'in başkenti Dakka'da gösteri yapan bir çok öğrenciye polis ateş açarak öldürdü. ¹ Öğrencilerin gösteri konusu ana dilleri olan Bengal dilinin varlığının tanınma istekleri idi çünkü üniversitelerinde bu dil ülkedeki güçlü kesimin konuştuğu başka bir dil ile yer değiştirilmek isteniyordu.

Dünyanın bir çok yerinde tarih boyunca farklı şekillerde yinelenen bir mesele idi bu. Sadece Bengaldeŝ'te değil, bir çok Avrupa ülkesinde de, örnek olarak Hollanda'da hükümet 2015 yılında, eğitimde İngilizce dilinin pozisyonunun, yerel anadillerin aleyhine, zaman içerisinde peyder pey güçlendirilmesine yönelik bir planı onayladı.

Bunlar benzersiz olaylar değildir. Hem Bengaldeŝ hem Hollanda'da olan bu olaylar aslında tamamen aynı mantıktan kaynaklanan “ben güçlüyüm, sus, ya da konuşmak istiyorsan benim dilimi konuş” meselesidir. Öte yandan tüm dilbilimcilerin dediği gibi (örnek olarak Ken Hale): “Bir dil öldmesi, aslında çok büyük entellektüel bir zenginliğin kaybedilmesidir, bu birisinin Louvre müzesinin üzerine bomba atması gibi bir şeydir.”

Sosyal adaletsizlik haricinde, bir kişinin ana diline saygısızlık yapılırken, bilinmesi gereken şey, biyolojik ve dilsel çeşitliliğin birbirinden ayrılamaz, ilişkili, ve biri diğerine bağımlı olduklarıdır. Dilsel çeşitliliğin kaybı aslında sürdürülebilir biyolojik çeşitlilik için gerekli olan geleneksel bilginin de kaybıdır. (64. BM-STK-konferansı sonuç deklarasyonu ², Bonn, 2011 ve Terralingua ³)

17 Kasım 1999 tarihinde UNESCO 21 Şubat gününü “Uluslararası Ana Dil Günü” olarak anons etti. 2007 yılında Birleşmiş Milletler Genel Meclisi üye ülkeleri “Dünyadaki tüm halklar tarafından kullanılan dillerin korunması ve muhafaza edilmesi” için çağrıda bulundu, aynı zamanda 2008 yılını da “Uluslararası Diller Yılı” olarak deklare etti ⁴. 2014 yılında UNESCO web sayfasında Genel Direktör Irina Bokova'nın mesajı Esperanto dilinde de yayınlandı. ⁵

Tüm bunlarla Esperanto dilinin ilgisi nedir? Aslında birbiriyle çok ilgilidirler, çünkü bu günün esas anlamı olan çok dillilik ve her insanın kendi ana dilini konuşma hakkı, aynı zamanda dünya Esperanto hareketinin de

volas neniun lingvon malaperigi, ni volas, ke ĉiuj lingvoj plu ekzistu, en respekto de ĉies lingvaj rajtoj, kaj regu lingva justeco. Ĉi-cele de multaj jaroj Universala Esperanto-Asocio (UEA) solene kunfestas ĉi tiun tagon, interalie por substreki ke Esperanto ne estas eliminanto de lingvoj, kiel estas uzataj la lingvoj de grandaj ekonomiaj kaj militistaj potencoj.

Esperanto, fakte estas protektilo kontraŭ la malapero de lingvoj, kiel diris s-ino Vigdis FINNBOGADOTTIR (prezidanto de la Respubliko Islando, 1980-1996): «Estas jam tempo ke la diversaj nacioj komprenu, ke neŭtrala lingvo povus iĝi vera remparo por iliaj kulturoj kontraŭ la monopolema influo de nur unu aŭ du lingvoj, kiel hodiaŭ tio pli kaj pli evidentiĝas. Mi sincere esperas, ke Esperanto rapide progresos por helpi ĉiujn naciojn de la mondo.»⁵

Eble iu ankoraŭ demandas: «Kial ĝuste Esperanto?». La kialo estas simpla. Malantaŭ Esperanto ne estas ŝtatoj, ekonomiaj sistemoj, imperiismaj strebadoj, nek popoloj, kies intereso estus la malaperigo de aliaj popoloj, ties lingvoj, aŭ akiro de iliaj merkatoj. Malantaŭ Esperanto estas nur bonvolaj homoj, kiuj celas justecon por ĉiuj kulturoj kaj ĉiuj lingvoj, en paco inter la popoloj.

«Plifortigi la rajtojn de la parolantoj de ĉiu lingvo estas la celo, al kiu esence kontribuas Esperanto.» (Prof. Robert Phillipson⁶). Esperanto estas ilo akcelanta atingon de justa komunikado kaj tiel de justaj rilatoj inter etnoj, kulturoj, popoloj. «... Mi esperas, ke Esperanto daŭrigos la plenumadon de tiu duflanka rolo subtenante diversecon kaj kreante unuecon.» (Rita Izsák, Speciala Raportanto de UN⁷)

Sekve Esperanto helpas ĉiujn pluvivigi sian lingvon. Ĉi tiu estas la klara mesaĝo, kiun esperanto-parolantoj el la tuta mondo volas sendi al ĉiuj tutmonde, la 21-an de februaro.

Ekkonu la internacian lingvon, Esperanton⁸ per <http://www.esperanto.net!>

UEA-informado⁹

(Renato Corsetti, Emilio Cid, Vasil Kadifeli, Stefano Keller - teamo ZPI)

gözettiği değerlerdir. Biz Esperantistler hiç bir dilin yok olmasını istemiyoruz, istediğimiz tüm dillerin bundan böyle de yaşamaya devam etmesi, dil haklarına saygı gösterilmesi, ve dünyada dil adaletinin hüküm sürmesidir. Bu amaçla Uluslararası Esperanto Birliği (UEA) uzun yıllar boyunca bu günü ciddiyetle kutlamakta ve diğer kullanılmakta olan ekonomik ve askeri potansiyeli yüksek dillerde olduğu gibi, Esperanto'nun diğer dilleri yok etmeye çalışmadığının altını çizmeye çalışmaktadır.

Izlanda Cumhuriyeti başkanı bayan Vigdis FINNBOGADOTTIR'in (1980-1996) da dediği gibi: “Günümüzde anlaşıldığı üzere, nötr bir dilin tekelci bir iki dil yerine kullanılması, değişik ulusların kültürlerini koruyabilmeleri için koruyucu bir set oluşturduğunu anlamaları için zaman gelmiştir. Esperanto dilinin dünyadaki tüm uluslara yardımcı olacak şekilde hızlı bir ilerleme kaydedeceğini samimiyetle umuyorum”.⁶

Belki hala birileri “Peki neden Esperanto?” diye soracaklardır. Sebebi çok basit: Esperanto dilinin arkasında bir devlet, bir ekonomik sistem, emperyalist amaçlar, başka halkları ve dilleri yok etmek, onların pazarlarını ele geçirmeye çalışan halklar bulunmamaktadır. Esperanto dilinin arkasında tüm kültürler ve tüm diller için adaleti amaçlayan, halklar arasında barış arzulayan iyi niyetli insanlar vardır sadece.

“Esperanto'nun amacı ve katkıda bulunduğu şey tüm dilleri konuşanların haklarını güçlendirmektir” (Prof. Robert Phillipson)⁷. Esperanto adil iletişime ve dolayısı ile etnik topluluklar, kültürler, halklar arasındaki adil ilişkilere ulaşımı hızlandıran bir araçtır. “...Umuyorum ki, Esperanto, çeşitliliği desteklemek ve birliği sağlamak gibi iki yönlü bu rolünü yerine getirmeye devam edecektir.” (Rita Izsák, BM Özel Raportörü)⁸

Esperanto herkesin dilini yaşamasına yardımcı olmaktadır. İşte bu net mesaj, her 21 Şubat'ta Esperanto konuşanların tüm dünyaya göndermek istedikleri mesajdır.

Uluslararası dili Esperanto ile tanışın <http://www.esperanto.net!>⁹

UEA bilgilendirmesi¹⁰

(Renato Corsetti, Emilio Cid, Vasil Kadifeli, Stefano Keller - teamo ZPI)

<http://www.linguistic-rights.org/21-02-2016/>

¹ http://www.linguistic-rights.org/dokumento/Final_declaration_64th_UN_DPI_NGO_Conference_Bonn_2011_amendments_Universala_Esperanto_Asoocio_UEA.pdf

² <http://terralingua.org/our-work/linguistic-diversity/>

³ <http://www.un.org/en/events/motherlanguageday/>

⁴ <http://www.unesco.org/new/en/unesco/events/prizes-and-celebrations/celebrations/international-days/international-mother-language-day-2014/>

⁵ http://www.linguistic-rights.org/uea/Justa_Komunikado_Lingva_Justeco_Vigdis_FINNBOGADOTTIR_prezidento_de_la_Respubliko_Islando_1980_1996.pdf

⁶ <http://www.linguistic-rights.org/esperanto-125/Dr-Robert-Phillipson-Professor-emeritus-125-years-of-Esperanto.html>

⁷ <http://www.linguistic-rights.org/esperanto-125/Ritalzsak-UN-independent-expert-on-minority-issues.html>

⁸ <http://www.esperanto.net>

⁹ <http://www.uea.org>

<http://www.linguistic-rights.org/21-02-2016/>

¹ <https://tr.wikipedia.org/wiki/Bengalce>

² http://www.linguistic-rights.org/dokumento/Final_declaration_64th_UN_DPI_NGO_Conference_Bonn_2011_amendments_Universala_Esperanto_Asoocio_UEA.pdf

³ <http://terralingua.org/our-work/linguistic-diversity/>

⁴ <http://www.un.org/en/events/motherlanguageday/>

⁵ <http://www.unesco.org/new/en/unesco/events/prizes-and-celebrations/celebrations/international-days/international-mother-language-day-2014/>

⁶ http://www.linguistic-rights.org/uea/Justa_Komunikado_Lingva_Justeco_Vigdis_FINNBOGADOTTIR_prezidento_de_la_Respubliko_Islando_1980_1996.pdf

⁷ <http://www.linguistic-rights.org/esperanto-125/Dr-Robert-Phillipson-Professor-emeritus-125-years-of-Esperanto.html>

⁸ <http://www.linguistic-rights.org/esperanto-125/Ritalzsak-UN-independent-expert-on-minority-issues.html>

⁹ <http://www.esperanto.net>

¹⁰ <http://www.uea.org>

Internacia
TAGO de la
GEPATRA
LINGVO

21-a de februaro 2016

La internacia lingvo **Esperanto** respektas kaj subtenas lingvan kaj kulturan diversecon tra la mondo.

Pri lingvoj: www.lingvo.info Pri interreta komunikado: www.esperanto.net | www.uea.org

Uluslararası
ANA DİLİ
GÜNÜ

21 Şubat 2016

Uluslararası dil **Esperanto** tüm dünyada dil ve kültür farklılığını destekler ve saygı duyar.

Diller hakkında: www.lingvo.info Kavimler arası iletişim hakkında: www.esperanto.net | www.uea.org

Irano invitas vin!



Iranaj e-istoj festos centjarigon de la landa e-movado en la 3-a Irana Esperanto Kongreso (IREK)

13 majo 2016 vendrede. Vi ĉiuj estas invititaj!

Jen aliĝilo al IREK-3:

<http://www.espero.ir/irek2-aligxilo/>

Portreto - Hori Jasuo



HORI Jasuo (naskiĝis en 1941) estas japana esperantisto kaj verkisto, honora membro de UEA. Li naskiĝis en Tokio kaj kreskis en la gubernio Gunma. En 1965 li finis studadon en la universitato de Kioto kaj poste instruis la anglan lingvon en altlernejoj kaj universitatoj. Li laboris en eldonejo en Tokio.

En 1960 Hori Jasuo memlernis Esperanton. . Ekde 1993 ĝis 2014 li estis estrarano de la Japana Esperanto-Instituto. Dum 12 jaroj li ĉefredaktore respondecis pri La Revuo Orienta kaj ekde 2001 estas redaktoro de "Esperanto en Azio", organo de la Komisiono de UEA pri Azia Esperanto-Movado (KAEM).

Li estis prezidanto de la komisiono de UEA pri la Azia Esperanto-Movado, KAEM de 2001 ĝis 2006. Li partoprenis en dudeko da UK-oj, de Varsovio (UK 1987) ĝis Lille (UK 2015) kaj en ĉiuj 7 aziaj kongresoj.

Dum la jaroj 2007 ĝis 2010 li estis estrarano de UEA pri landa kaj regiona agadoj.

Li estis honorita per la Premio Ossaka en 2004 pro la agado en KAEM kaj pro la eldono de "Raportoj": Ekde la jaro 1998, li verkas serion de "Raportoj el Japanio" - ĉiun jaron li eldonas volumon pri la antaŭa jaro. En 2015, la numero atingis 18.


Li estis honorigita per la premio Onisaburo Deguĉi de UEA en 2011.

En 2009 li iniciatis Internacian Esperanto-sumoo-n por ke esperantistoj legu pliu multe da Esperanto-libroj. En januaro 2016 okazis la 38a Esperanto-sumoo, en kiu partoprenis 277 homoj el 29 landoj. Ĝi multege kontribuas al la libro-kulturo de Esperanto. Li celas 500 partoprenantojn en du jaroj.

En 2010 li iniciatis Societon por parkere kanti la himnon Espero en klopodo antaŭenigi parkeran scipovon de la Esperanto-himno kaj per tio doni al la esperantistoj pli da memfido pri ilia Esperanto-kapablo.

Krome li faris 6-fojajn prelekturajn en Francio, kaj kontribuis al amikeco inter la du landoj, kaj precipe post 2011, kiam okazis la Japana Katastrofo, li prelegis pri la temo: "Japanio post la katastrofo".

De la 11-a de marto 2011 li regule informadis la esperantistaron pri la evoluo de la situacio en Japanio kaj raportadis rektajn spertojn. Ĉiuj raportaĵoj aperis sur la retejo de SAT



Verkoj

"Kantu Nian Naŭan Simfonion" (en la japana),
"Angla Gramatiko Cougar" (en la japana kaj la angla),
"Raportoj el Japanio" (14 volumoj), aperinta ekde 1997,
"Invito al Esperanto" (en la japana kaj Esperanto),
"1400 citaĵoj klasifikitaj laŭ gramatikaj eroj" (en la japana kaj la angla),
"Monatoj tra la Mondo" (verkita de diverslandaj 11 esperantistoj),
"Vivoj tra la Mondo" (verkita de 11 diverslandaj esperantistoj).
Li estas tre regula kunlaboranto de la gazeto Monato kaj ankaŭ regule verkas por Sennaciulo.

D-ro Bariş rekomendas



La vintraj monatoj

Dum vintraj monatoj la bone konata kaj danĝera malsano, kiun ni nomas "gripo" reviviĝas. Ĉi-jare la "gripo de porko" (H1N1) denove revenis al nia lando. Mikroboj de gripo abundas ĉie kaj atakas homojn vaste. Homoj sen bona imuneco aŭ homoj kiuj ne estas atentemaj al higieno malsaniĝas kaj la klinikoj pleniĝas kun malsanuloj.

Pro tio ni, kuracistoj rekomendas

- * bonan kaj ekvilibran nutraron
- * konsumadon de citrusaj fruktoj kiuj enhavas vitaminon C
- * oftan laviĝon de la manoj per kiuj ni daŭre tuŝas diversajn aĵojn, kiujn aliuloj kaj eble malsanuloj tuŝis antaŭ ni

Kuracistoj ne rekomendas antibiotikojn sen ilia decido kaj priskribo. Kaj fakte por pli ol unu jaro oni ne povas aĉeti antibiotikojn el apotekoj sen priskribo de kuracisto.

Antibiotikoj estas por bakterioj sed gripo estas malsano kiun kaŭzas virusoj, do ili rekte ne helpas kontraŭ-batali gripon. Fakte por virusoj ni ne posedas fortajn kuracilojn. Estas kuraciloj, kiujn ni nomas kontraŭvirusaj kuraciloj, sed ili nur apogas la korpon dum ĝia batalo kontraŭ la viruso de gripo.

Do kuracistoj priskribas antibiotikojn se estas la danĝero, ke la malsanulo povas esti atakita per pluaj bakterioj nun ke lia/ŝia imuneco estas malpli forta pro la gripo. Por kuraci ordinarnajn malvarmumojn, kiujn ni emas taksu kiel gripo, aparte de specialaj kazoj oni ne multe bezonas antibiotikojn.

Uzado de antibiotikoj senbezone estas ankaŭ danĝera ĉar ili mortigas aliajn mikrobojn, kiuj fakte estas bona por nia korpo. Do bonvolu ne uzu ilin sen la konsento de la doktoro. ■

El la kajero de Lisa Golomb



Petveturilante

Mi vojaĝadas en Meksiko. Mi estas tridek jara kaj mi sole vojaĝas, kiel kutime. El la ĉefurbo, mi deziras atingi la majan landon, suden. Sed trajnoj estas tiel aĉaj (malpurigitaj, malrapidaj), ke mi finfine decidas petveturi. Mi jam havas sperton pri tio kaj mi ĉefas parolante la hispanan lingvon.

Kamionisto haltas, mi supreniras, ĉio glatas. Sed noktiĝas kaj ni ankoraŭ veturiladas en la kamparo. Neniu urbo kaj neniu vilaĝo videblas, kaj la etoso ekŝanĝiĝas.

- Nu, diras li, vi modernaj virinoj ne timas la virojn, ĉu ne? La viroj en via lando tre bonŝancas!

Kaj dirante tion lia rigardo ekaspektas malĉasta. Tio timigas min kompreneble. Li estas maljuna, fortika, dika, mi tute ne deziras amori kun li. Do, mi ekrespondas :

- Ah, ĉu vi scias, ke en Francujo la meksikanoj havas malbonan famon? Tamen mi dezirus konigi al mia familio kaj geamikoj, ke eĉ ĉi tie ekzistas honorindaj viroj, kiuj respektas la virinojn. Ĉu vere?

Mi konas la karakteron de la hispanoj, mi scias ke ilia famo estas grava afero por ili. Fakte, tio sufiĉis kaj li rapide respondis :

- Ne plu disfamigaĵojn! Neniu problemo. Vi, trankvile enlitiĝu malantaŭe en la kamiono. Mi dormos sidanta ĉe la stir-seĝo.

Tiel ni faris. Mi tre bone dormis en lia lito. Ĉu li same? Mi ne scias.

Plie, venontan matenon, kiam ni finfine atingis la urbeton, li regaligis min per tre bona matenmanĝo. Kaj amike ni disiĝis.

Mi daŭrigis mian petveturiladon memfide kaj sate.

Plaĉas al mi rakonti tion, pro memoro, ĉar tion mi promesis al li.

Honorindaj Meksikanoj eksistas, mi jesas kaj jesigas. ■

Lisa Golomb - Francujo

Leterojn ni ricevis el geamikoj



Saluton.

Mi elkore gratulas vin kaj vian teamon eldoni tiun ĉi grandvaloran revuon. Ambaŭ numeroj estas plenplenaj de valoraj informoj pri Turkio, Esperanto, kaj Monda Esperanto Movado.



Ege plaĉis min la facila kurso por komencantoj. Ĝi efikas duflanken por la lernantoj de la Esperanto kaj dolĉan Turkan lingvon. Mi multe ĝuis kaj lernis turkajn vortojn en la vortlisto. Ankaŭ mi elektis tiun saman lerno-rakonton de la Musoj por mia libro kiun mi verkis pere de Urdu kaj Nepala lingvo. La materialo estas ege interesa kaj lernantoj rapide progresas de facila nivelo al iom malfacila. Mi elkore gratulas vin por komenci la kursaron kiel la parto de via bonbela revuo.

Mi esperas ke Turka Stelo, rolos gravan rolon inter la esperantistaro precipe inter la esperantistoj de najbaraj landoj, kiel Armenio, Irano, Pakistano, Hindio, Nepalo, Bangladeŝo, Srilanko kaj Indonezio. Karega amiko ĉu vi permesos min ke mi sendu Turkan Stelon al miaj lernantoj en Nepalo kaj ankaŭ al miaj esperantaj amikoj en mia fejsbuka listo?

Denove bonvolu akcepti miajn elkorajn gratulojn por vi ĉiuj. Baldaŭ mi ŝatos renkonti vin kaj danki pro viaj senlacaj dediĉoj por la disvastigo de esperanto kaj enkonduko de Turka Kulturo.

Frate via

Mian Salam SHANY

Internacia Ĵurnalisto, Volontula Esperanto Instruisto
kaj Volontula Internacia Kunordiganto.
<http://www.southwestern.edu.np/>



Saluton,

Mi estas 40 jar-aĝa kaj reteja programisto. Mi loĝas en Istanbul. Por longa tempo mi ne faris ion gravan, krom mia laboro.



Ĝis antaŭ unu monato mi sciis nur kio estis Esperanto, sed nenio alia.

Honeste, mi eĉ ne havis deziron lerni ĝin. Mi povas paroli la anglan bone. Esplorante ion pri lingvoj, mi eltrovis Duolingo-n. Iom da tempo post kiam mi komencis uzi la retejon, mi trovis Esperanton kurson tie kaj nur por satigi mian scivolemon kaj havi bazan ideon pri kia lingvo ĝi estis, mi iel komencis la kurson. Tiam, nekomprenante kio vere okazis, mi subite trovis min lerni la kurson laboreme kaj tutvolonte. Verŝajne la unua kialo por tia granda influo temas pri la fakto ke Esperanto estas tre facile lernebla lingvo kaj tial ĝi plej frue rekompencas la lernanton. Mi povas ĝuste diri, ke ekde mia komenciĝo pasis 23 tagoj, dum kiam mi faris nenion krom studi Esperanton kaj fakte, estas kelkaj tagoj dum kiuj mi studis po pli ol 10 horojn. Nun mi pensas ke mi jam akiris la gramatikon sufiĉe bone sed mi, kiel ĉiu komencanto, konstante eraras kiam mi skribas kaj provas paroli, kaj legas tre malrapide. Kun neniu mi ankoraŭ provis paroli.

En la revueto mi legis preskaŭ ĉion en la unua numero, krom la longa el la du rakontoj. Multe feliĉigas min, ke ekzistas tia klopodo kaj mi elkore deziras sukceson al ĝi. La dato de ĝia fondiĝo estis perfekta por mi!

Ege Madra (40) Istanbul

(Ege skribis tiun en la 4a de januaro en Turka lingvo, kaj tradukis in al Eo en la 3a de februaro por nia revueto - la redakcio)

CEZARO ROSSETTI
KREDU MIN,
SINJORINO!



Kredu min sinjorino de Cezaro Rozetti

...Cezaro Rozettii rakontas memorojn el sia vivo kiel foira vendisto en Anglujo kaj Skotlando. Lia rakontokapablo estas neordinara. Li neniam donas iun eventon aŭ iun detalon tro multe nek tro malmulte, ĉio estas konciza kaj tamen plenviva kiel la vivo mem. Humoron li havas. De la unua linio ĝis la lasta ni kvazaŭ konkrete travivas kune kun li tiujn jarojn de lia vivo. Tre multe da homoj ni renkontas, kaj ni bezonas nur kune kun li iomete kunesti kun ili por konatiĝi kun ili kvazaŭ de interne... [el re enzo de Stellan Engholm en la katalogo de UEA]

Mi legis tiun romanon dum Esperanto Sumoo kaj trovis ĝin tre amuza, la verkisto rakontas la travivaĵojn de iu kolportisto. Jen kelkaj citaĵoj el la romano:

"Ĉu vi havas broson por forbalai brosvendistojn for de la porda ŝtupo?", "Nun mi klare vidas, ke Esperanto estas mirinda lingvo, per kiu samlandanoj ne povas kompreni unu la alian!", "El la ŝranko paŝis skeleto. Ĝi faris du paŝojn al ni, iom klinis la kapon, etendis la brakon kaj diris : Ĉu vi ricevis vian senpagan specimenon?", "Cezaro? tio estas nomo de hundo!", "Dankon. Estas jene : Ĉu via edzino batas vin hejme?", "Kredu ne Kredu, sed dommastrinoj ne ŝatas havi leonidojn en la ĉambro!", "...sed vi ĉiuj scias, ke Benzo mensogas kiel funebra parolo!" ■

La libron vi povas elŭti el ĉi tiu ligilo: <http://www.fadedpage.com/showbook.php?pid=20140614>

Mia kato mortis - Konuralp Sunal



Kedim ölü
Bahçede gömülü
Sonsuz kozmik bir petek
Kara evrenlere örülü
Bir yanı karanlık
Öteki ışık
Bizim taraftan bakınca
Ölüler çıkar karanlığa
O taraftan bakınca
Hoşgelmişsin ışığa
Niye sorusunu umursamaz
Bu evrensel yanılısama
Umursa veya umursama
Elinden kayar tüm sular
Sahip oldum sanma!

KONURALP


** Kun permeso de Konuralp Sunal kaj respekto al li kaj al lia kato.*

Mia kato estas morta
Entombigita en la ĝardeno.
Senfina kosma abelĉelaro
Al nigraj kosmoj plektita.
Unu flanko malhela
La alia luma.
Rigardante de nia flanko
Mortintoj alvenas al la mallumo.
Rigardante de la alia flanko
Bonvenon al la lumo.
Ne zorgas la demandon "kial?"
Tiu universala iluzio.
Zorgu aŭ ne zorgu
Ĉiuj akvoj forglatas de viaj manoj.
Ne pensu ke vi ilin posedas!

KONURALP

UK 2016 - 101a Universala Kongreso de Esperanto en Nitra (Slovakio)

La 101-a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 23-a is
30-a de julio 2016 en la urbo Nitra, en Slovakio.





Lernu fremdajn lingvojn!

Mi ne scias la germanan.

Inter Budionnij kaj Aleksejevka ni devis permane suprenigi sur monteton plurajn kanonojn, ĉar ili ĝis radcentro enkotigis. Kiam la trian fojon venis mia vico, kaj ĉirkaŭ la mezo de la deklivo komencis regliti la brutpeza pafilego, mi imitis kvazaŭ mi irus por fari neceson kaj mi deflankigis.

Mi konis la direkton al nia kvartiro. Trairinte grandegan sunflorkampon, mi atingis stoplejon. La grasa, nigra tero gluiĝis al miaj ŝuoj, kiel la plumbo-aldonaĵoj de la subakvigistoj, kun kiuj ili mergiĝas al la marfundo. Mi pensas, mi iris dum dudek minutoj, kiam mi subite troviĝis rekte okulo al okulo kun hungara serĝento kaj kun germano, pri kiu mi sciis nenion, ĉar mi ne konis la germanajn rangojn. Estis frenezige malbonŝanca afero kuri ĝuste inter iliajn brakojn, ĉar la tereno estis tute ebena.

La serĝento staris, la germano kun genuoj disetenditaj sidis sur malgranda tendara seĝo. La serĝento fumis, la germano manĝis. El ia tubo, simila tiun de dentkremo li elpremis fromaĝo-paston sur panpecon, kaj nur per okuloj li donis al mi signon por halti.

— Was sucht er hier — li demandis.

— Kion vi serĉas ĉi tie? — tradukis la serĝento. Mi diris, ke mi perdis mian taĉmenton.

— Er hat seine Einheit verloren — diris la serĝento. — Warum ohne Waffe?

— Kie estas via pafilo? — demandis la serĝento. Mi diris, ke mi apartenas al laborservo.

— Jude — diris la serĝento.

Tiun vorton eĉ mi komprenis. Mi klarigis, ke mi ne estas judo, sed kiel peranto de la sindikata gazeto Népszava mi estis mobilizita en specialan laborroton.

— Was? — demandis la germano.

— Jude — diris la serĝento.

La germano stariĝis. Li forigis la panerojn de sia kamizolo.

— Ich werde ihn erschiessen — li diris.

— Vin la sinjoro Feldwebel* nun mortpafos — tradukis la serĝento.

Mi sentis, ke min inundas la ŝvito kaj ekkirliĝas mia stomako. La germano ŝraubfermis la fromaĝopastan tubon kaj prenis la pafilon. Eble, se mi sciis germane, mi sukcesus klarigi al li, ke mi ne surhavas flavan brakbendon, do mi ne povas esti judo, kaj tiam ĉio okazus alie.

— Er soll zehn Schritte weiter gehen.

— Iru for dek paŝojn — diris la serĝento.

Mi iris dek paŝojn. Dume ĝis maleolo mi enkotigis.

— Gut.

— Bone.

Mi haltis. La Feldwebel levis la pafilon kontraŭ min. Mi memoras nur tion, ke subite mia kapo terure peziĝis, kaj preskaŭ diseksplodis miaj intestoj. La Feldwebel mallevis la pafilon.

— Was ist sein letzter Wunsch? — li demandis.

— Kio estas via lasta deziro? — demandis la serĝento. Mi diris,

Vortareto

permane	el ile
supren-igi	yukarı çıkartmak
kanono	top (silah)
rad-centro	tekerlek ortası
en-kot-iĝi	çamura batmak
ĉirkaŭ	civarında
deklivo	yokuş
re-gliti	tekrar kaymak
brut-peza	acımasızca ağır
pafil-ego	kocaman silah
imiti	taklit etmek
kvazaŭ	sanki
de-flank-iĝi	yoldan sapmak
kvar-tiro	dört teker/çeker
tra-irinte	içinden geçerken
sunfloro	ay çiçeği
kampo	tarla
stoplejo	samanlık
grasa	yağlı
glu-iĝi	yapışmak
plumbo	kurşun (maddesi)
aldonaĵo	ekleniti, ilave
sub-akv-ig-isto	dalgıç
merg-iĝi	batmak (suya)
mar-fundo	deniz dibi
trov-iĝi	bulunmak
rekte	doğrudan
okulo al okulo	göz göze
serĝento	çavuş
rango	sıra, rütbe
frenezige	çıldırtıcı
mal-bon-ŝanca	kötü şans
brako	kol
tereno	yeryüzü şekli
ebena	düzlük
genuo	diz
tendara	çadıra ait
tubo	tüp
dent-kremo	diş kremi
el-preni	dışarı almak
pasto	macun
pan-peco	ekmek parçası
signo	işaret
taĉmento	askeri takım
aparteni	ait olmak
labor-servo	iş servisi, geri hizmet
judo	yahudi
klar-igi	netleştirmek
peranto	aracı
sindikata	birlik, sendika
mobilizita	mobilize edilmiş
labor-roto	iş örgütü/birliği
star-iĝi	ayağa kalkmak

ke mi volas feki.

— Er will scheissen — tradukis la serĝento.

— Gut.

— Bone.

Dum mi faris mian aferon, la Feldwebel tenis la pafilon kolbo-al-tere. Kiam mi stariĝis, li levis ĝin.

— Fertig? — li demandis.

— Ĉu finite?

Mi diris, ke finite.

— Fertig — raportis la serĝento.

La pafilo de la Feldwebel verŝajne pafis false, supren, ĉar li celis al mia umbiliko. Mi staris tiel ĉirkaŭe minuton aŭ unu minuton kaj duonon. Poste plu al mi celante diris la Feldwebel:

— Er soll hupfen.

— Ransalto — tradukis la serĝento.

Post la ransaltado sekvis rampado. Post la rampado dekkvin brakfleksoj en kuŝanta pozo. Fine diris la Feldwebel, ke mi turniĝu retro.

Mi faris retroturniĝon.

— Stechtschitt!

— Parada marŝo! — interpretis la serĝento.

— Marsch! — diris la Feldwebel.

— Marŝu, ek! — tradukis la serĝento.

Mi ekiris. Eĉ iri estis apenaŭ eble, kaj tiom pli fari paradan marŝon. Flugadis la kotbuletoj super mia kapo. Mi povis antaŭeniri nur kun freneziga malrapideco, kaj dume mi sentis, ke la Feldwebel celas al la mezo de mia dorso. Eĉ nun mi scius montri la punkton, al kiu direktiĝis la pafil-tubo. Se ne estus tiu granda koto, mia timego daŭrus nur kvin minutojn. Sed tiel pasis eĉ duonhoro, ĝis mi kuraĝis alteriĝi kaj rerigardi.

Ankaŭ la italan mi ne scias: bedaŭrinde mi ne havas lingvokapablon. Pasintjare somerumante en la kadro de dektaga IBUSZ-grupvojaĝo** en Rimini, antaŭ la luksa hotelo Regina Palace mi rekonis la Feldwebel-on. Mi ne havis bonan ŝancon. Se nur duonminuton pli frue mi alvenus tien, mi mortbatus lin, sed tiel li min eĉ ne rimarkis. Kun pluraj aliuloj li suriris vitrotegmentan ruĝan aŭtobuson, dum mi, pro manko de bezonata lingvoscio, sciis nur hungare kriegi:

— Ne startu! Elbusigu tiun faŝistan porkon!

La helpordisto, duonkapon pli alta ol mi, iu kolorhaŭta Sudanano min minacis per fingro kaj mansignis, ke mi forportu min. Ankaŭ al li mi ne povis klarigi, kio okazis, kvankam li eble krom la itala komprenis ankaŭ la francan kaj la anglan. Sed mi, bedaŭrinde, krom la hungara parolas neniun alian lingvon. ■

* Serĝento (germanaĵo)

** IBUSZ — hungara turisma entrepreno

Örkény, István. "Lernu fremdajn lingvojn!" tradukis Márton Fejes, en *Hungara Antologio*, redaktis Vilmos Benczik (Budapest: Corvina Kiadó, 1983), p. 405-406. *El Unuminutaj Noveloj*. En *Hungara Antologio*.

Fonto: http://autodidactproject.org/other/orkeny_lingvoj.html

pan-ero	ekmek kırıntısı
kamizolo	forma ceketi
mort-pafi	silahla vurup öldürmek
inundi	dolup taşmak, sel şeklinde basmak
ŝvito	ter
ek-kirl-iĝi	çırpımaya başlamak
stomako	mide
ŝraub-fermi	çevirerek kapatmak
sur-havi	giymek, takmak
brak-bendo	kol bandı
paŝo	adım
maleolo	ayak bileği
pez-iĝi	ağırlaşmak
dis-eksplo-di	patlayıp dağılmak
intesto	bağırsak
mal-levi	aşağı indirmek
deziro	istek
feki	sıçmak
kolbo-al-tere	dipçiği-yere doğru
ver-ŝajne	herhalde
celi	amaçlamak, hedeflemek
umbiliko	göbek deliği
ran-salto	fare sıçraması
rampado	sürünme
brak-flekso	kol bükme >>beden hareketleri
kuŝanta	yatar vaziyette
pozo	poz, vaziyet
turniĝi	dönmek
retro	ters, geri
parada marŝo	tören yürüyüşü
ek!	haydi, başla
apenaŭ	hemen hiç
flugadis	sürekli uçmak
kot-buleto	çamur köftesi (parça)
dorso	sort
punkto	nokta
direktiĝi	yönlenmek
pafil-tubo	silah namlusu
koto	çamur
timego	büyük korku
kuraĝi	cesaret etmek
re-rigradi	tekrar bakmak
al-teriĝi	toprağa oturmak
somerumante	yazı geçirirken
kadro	çerçeve
mort-bati	dövüp öldürmek
sur-iri	yukarı çıkmak (binmek)
vitro-tegmenta	cam damlı
elbus-igi	otobüsten çıkartmak
porko	domuz
hotel-pordisto	otel kapıcısı
kolor-haŭta	renkli derisi olan
minaci	tehdit etmek
man-signi	elle işaret etmek



La Unua Puto

Iam estis eta reĝolando ĉirkaŭ lago. Dum unu tre varma somero tute ne pluvis kaj la lago sekiĝis. La loĝantoj maltrankviliĝis kaj vizitis la reĝon.

"Ne pluvis dum tre longa tempo. Sur niaj kampoj nenio plu kreskas!" diris la farmistoj.

"Ne plu estas fiŝoj. Kiel ni povos vivteni nin?" demandis la fiŝkaptistoj.

"Savu nin el tiu katastrofo, bona reĝo" petis la virinoj kaj iliaj infanoj ploris pro soifo.

La reĝo ordonis al siaj kvar generaloj iri en ĉiun direkton por trovi akvon.

La unua generalo iris orienten al la sunleviĝo, la dua suden al polvo kaj varmego, la tria okcidenten al la sunsubiro, la kvara sekvis la polusan stelon. Ili serĉis tage kaj nokte, nokte kaj tage, supre kaj sube, ĉie ili serĉis sensukcese.

Tri el la generaloj revenis kun malplenaj manoj. Sed la generalo kiu iris norden persistis por ne malplaĉi al la reĝo. Finfine li atingis malvarman vilaĝon en la montaro. Dum li sidis ĉe la subo de monto maljunulino alvenis kaj alproksimiĝis al li. La generalo fingromontris la horizonton kaj diris:

"Mi venas el bela reĝolando kie ne pluvis dum tuta jaro. Ĉu vi bonvolus helpi min trovi akvon?"

La virino petis la generalon kuniri kun ŝi supren al la monto kaj ili eniris kavernon.

"Ankaŭ mi ne havas akvon en nia lando," ŝi diris. Montrante la glacipecojn en la kaverno ŝi plu diris "Ni nomas tiun glacio. Prenu iom de ĝi kaj viaj reĝolandanoj neniam plu spertos soifon."

La generalo forrompis grandegan pecon, metis ĝin sur sian ĉevalveturilon kaj rapidis hejmen.

Kiam li atingis la kortegon, la giganta glacipeco fariĝis tute eta glacipeco. Neniu en la kortego antaŭe vidis glacieron, do ĉiuj rigardis ĝin kun miro.

"Certe temas pri akvo-semo!", subite diris unu el la generaloj.

La reĝo tuj ordonis planti tiun 'akvo-semon'.

Dum la farmistoj fosis truon la glacipeco pli kaj pli malgrandiĝis. Rapide ili metis la semon en la truon, sed antaŭ ol ili sukcesis kovri ĝin, ĝi malaperis.

La farmistoj miris kaj ekmaltrankviliĝis. Ili fosis la teron pli kaj pli profunden dum la tuta nokto por trovi la misterplenan semon.



Frumatene la reĝo vidis la farmistojn dormantajn ĉirkaŭ truo. Scivoleme li enrigardis kaj pro surprizo li ekkriis: "Vekiĝu, miaj karaj. La akvo-semo kreskis! Estas akvo en la truo!"

Jen tiel kreĝis la unua puto. ■

Prenita de Bukboks

<http://www.bookbox.com/>

Mallonga Historio de Filozofio (2)



Saluton,

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la mallongan historion de Filozofio kun Platono, kiu estis la lernanto de Sokrato.

Vasil Kadifeli (1959) İstanbul

Platono

Oni povas diri ke Platono estis la Ŝekspiro de la tiama tempo ĉar ni ĉion scias de liaj verkoj. Laŭ Platono la mondon nur komprenas la filozoj ĉar ili pridemandas ĉion. La aspekto kaj le vero estas tute aliaj aferoj. Ni ne komprenu la mondo per niaj sentoj sed per niaj pensoj. Tiu kio rompas sian ĉenon estas filozofo.

Platono verkis pri la Teorio de Formoj. Formo estas la perfekta objekto, sed tiuj objektoj, kiujn ni vidas, sentas, spertas, pensas ktp en la mondo, estas nur proksimaĵoj de la vera Formo. Se ni volas kompreni kio estas iu objekto ni devas koncentriĝi sur ĝia "Formo" kaj ne sur la objekto mem. Nur filozofoj povas "pensi" pri tiuj formoj. Ĉiuj aliaj homoj estos misgvidataj de siaj "sentoj".

Platono plue kredis ke nur filozofoj povas pensi pri la bono, kaj en lia verko "Politia" aŭ "ŝtato" kontraŭstarante demokration li proponis ke nur filozoj devas estri la ŝtaton por la bono de la popolo. La popolo mem ne scias estri kaj decidi. Ni povas diri, ke se tio realigus, eble tiam li eĉ malpermesus pentradon ĉar pentristoj ne pentras la "Formon" sed nur la aspekton de objektoj. Do lia regado fariĝus diktatoreca ŝtatregado.

Post Sokrato, Platono daŭrigis instruadon pri filozofio kaj instruis al multaj gravaj homoj de la filozofia historio. Unu el tiuj estis Aristotelo, kiu poste fariĝis la insruito de Granda Aleksandro. ■

(daŭrigota)

Anonco

La libro "Nazim Hikmet kaj liaj Poemoj" estos baldaŭ publikigita per eldonejo Mondial.



- 60 poemoj

- Vivpriskribo de Nazim Hikmet

- Du antaŭparoloj

1) Prof. Gündüz Vassaf

2) Halil İbrahim Özcan
(Viĉprezidanto de la Internacia Turka PEN Asocio)

Tradukis:

Vasil Kadifeli

Redaktis:

Renato Corsetti

Hirota Masaaki

La 9-a Mezorianta Kunveno

Al nia Kunveno kiu okazos inter la 1-a kaj 4-a de aprilo jam aliĝis 33 homoj kaj la programo de la prelegoj iom post iom bildiĝas. Ni ankaŭ decidis pri aldona AMO seminario (Aktivulo MaturiĝO) kaj ĝiaj programeroj ankaŭ aperis en nia retejo. Ĉi tiu AMO seminario estos la 23-a e la viĉo. Jen la ligilo:

https://uea.org/vikio/La_naua_Mezorienta_Kunveno_en_Turkujo_en_2016

Kaj jen la programo:

Vendrede 2016.04.01

12:00-13:00 Alveno de la partoprenantoj, enloĝigo.

13:00 Tagmanĝo

16.00 AMO-seminario

Prezentado de la seminario

Sinprezentoj, aŭdo de raportoj el unuopaj landoj.

Prezento de la situacio en la tuta regiono (Renato Corsetti)

Mallonga enkonduko pri la celoj de la seminario (Sara Spano;)

18:00 Interkona vespero kaj prezentado de Kapadokjo.



Sabate 2016.04.02

09:00-12:00 Vizito de la urbo Urgupo

09.00-12.00 AMO-seminario

Aparta prezentado de la situacio en unuopaj landoj kaj proponoj pri evoluigo de ĝi

La Esperanto-movado en Turkujo: evoluoj kaj problemoj (Vasil Kadifeli)

Instruado de Esperanto en pluraj landoj esperantisme ekevoluantaj (Annie Grente)

Spertoj en similaj afrikaj landoj (Mireille Grosjean)

Ideoj por instruistoj (Anna Lowenstein)

Laborado en etaj grupoj (laŭlande/laŭinterese). Kreo de planoj, ankaŭ por kunlaboro.

13:00 Tagmanĝo

15:00-16:30 Prelego de Vasil Kadifeli: Nazim Hikmet: vivo kaj poemoj.

16:30-18:00 Prelego Yumehio-terapio, Gholamreza Azarhiushang

18.00-19.00 Prelego de Mireille Grosjean pri Turkujo: Kien iras tiu mirinda lando?

19:00 Vespermanĝo

Post vespermanĝo komuna babilado kaj filmeto pri Naziam Hikmet

Dimanĉe 2016.04.03

09:00-12.00 AMO-seminario

– Fareblaj agadoj en La Meza Oriento kaj Norda Afriko

Enkonduko de Sara Spano' kaj Renato Corsetti

- Kiel prezenti Esperanton al arablingvanoj

- Kiel realigi belan retan paĝon en la araba

- Kion fari en Turkujo (Murat Ozdiuzdar kaj Vasil Kadifeli)

- La aparta situacio en Israelo: ĉu helpo aŭ problemo? (Renato Corsetti)

12:00-13:00 Manĝado de specialaĵoj kunportitaj de la partoprenantoj

13:00 Tagmanĝo por dezirantoj

15.00-16.00 Turkaj lernantoj prelegas pri fama homo el Kapadokio

16.00-17.00 Jusuf prelegas pri sia vojaĝo al Francujo

17:00-18:00 Annie Grente: Instruado de Esperanto en Tanzanio

18.00-19:30 Prelego de Lars Sözüer pri BEMI: Biciklista Esperantista Movado Internacia (faka asocio de TEJO)

20:00 Vespermanĝo

21:30 Filmo pri Nazim Hikmet

Lunde 2015.04.04

9:00-12:00 AMO-seminario

Aŭdo de konkludoj kaj planoj, precipe el la tria tago.

Kompilo de rekomendoj – al UEA, al TEJO, al esperantistoj de la regiono.

Eventuala formiĝo de laborgrupoj por agi post la seminario.

Pritakso (parole kaj skribe), ĝisoj kaj kisoj.

13:00 Tagmanĝa paŭzo

15:00-16:00 Vizito en la urba bazaro

16:00-17:00

19:00-21:30 Vespermanĝo-adiaŭa vespero

Dum la postaj du tagoj ekskursoj kaj reveno al Istanbul.

Kio estas TEJO?



La Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) estas organizo por junaj parolantoj de Esperanto (ĝis inkluzive 29-jaraĝaj) kun individuaj membroj kaj landaj sekcioj. Estas nuntempe 46 landaj sekcioj plus ĉirkaŭ 13 landaj organizoj kun kiu TEJO havas kontakton, sed kiuj ankoraŭ ne estas membroj. TEJO mem estas la junulara sekcio de Universala Esperanto-Asocio.


TEJO organizas Internacian Junularan Kongreson, ĉiujare en malsama loko tra la mondo. IJK estas semajndaŭra okazaĵo de koncertoj, prezentaĵoj, ekskursoj, kaj ĝenerala amuziĝo kiu allogas junulojn el la tuta mondo. TEJO ankaŭ organizas kelkajn junulajn seminariojn ĉiujare. Tiuj ĉi seminarioj kunigas internacian grupon de junuloj por diskuti aktualan temon. Pasintaj seminarioj havis temojn pri homaj rajtoj, tutmondiĝo, lingvo-problemoj, kaj la Interreto. La seminarioj daŭras unu semajnon kaj plej ofte enhavas trejnajn elementojn por ke partoprenantoj ne nur spertu internacian diskuton sed ankaŭ akiru novajn kapablojn.

UEA, kies sekcio estas TEJO, eldonas la revuon Kontakto kun la movada rubriko TEJO tutmonde, kaj ankaŭ la retan informbultenon TEJO-aktuale. Kontakto estas socikultura revuo, kiu celas junajn legantojn samkiel komencantojn kaj enhavas artikolojn pri ĝeneralaj temoj interesaj por la junularo kaj en facila lingvaĵo. TEJO Tutmonde estis alia revuo kun novaĵoj pri junulara Esperanto-agado internacie, kiu per decido de la estraro estis transformita en rubrikon. TEJO-aktuale celas informi pri aktualaĵoj el la tuta Esperantio.

TEJO ankaŭ administras Pasportan Servon, reton de Esperanto-parolantaj gastigantoj kiuj senpage gastigas Esperanto-parolantajn vizitantojn. ■

Por pli da informoj legu: https://eo.wikipedia.org/wiki/Tutmonda_Esperantista_Junulara_Organizo

Krucvort-enigma (facila)



Horizontale:

1. Akiri per mono.
2. Malsanulejo.
3. Hejmo de birdoj.

Vertikale:

1. Ŝtono rompita la _____ de la aŭto.
2. Eks, bo, mal ktp. estas _____.
3. Persa lando.


1. Akson, 2. Prefiksoj, 3. Irano

Vertikale

1. Aĝeti, 2. Hospitalo, 3. Nesto

Horizontale

SOLVOS



HORIZONTALALE

- 1) la plej ampleksa romano en Esp.
- 2) sufikso havanta tri sencojn
- 3) harmonia kunsonoro
- 4) polico pri ĝi gardas
- 5) oni diras pri tiuj kiuj ne ĉeestas
- 6) nombro
- 7) sur bordo troviĝas
- 8) juvela ŝtono
- 9) prepozicio

- 10) nia plej fidela akompananto
- 11) itala rivero
- 12) la plej granda batalo en Esperantujo
- 13) estas maldolĉe aŭdi tion ĉi de virino
- 14) geamantoj celas fariĝi

VERTIKALE

- 1) branĉo de poezio
- 4) metalo
- 11) prepozicio
- 15) prepozicio
- 16) grandfolia kreskaĵo apudvoja
- 17) fama monto japana
- 18) interjekcio uzata precipe en teatro
- 19) en la Alpoj oni vidas multajn
- 20) metalo
- 21) ruĝa farbo
- 22) vorteto por la esprimo de insisto, certigo
- 23) Aleksandro la Granda estis pri ĝi fakulo
- 24) tridimensia geometria formo
- 25) la plej ofta vokalo en Esp.

Horizontalale: 1 La Faraono, 2 ujo, 3 akordo, 4 ordo, 5 ili, 6 ok, 7 kajo, 8 opalo, 9 sub, 10 ombro, 11 Po, 12 ionujo, 13 ne, 14 paro, 15 en, 16 lapo, 17 Fujiĵama, 18 bis, 19 roko, 20 oro, 21 okro, 22 ja, 23 nodo, 24 kubo, 25 o.

SOVL0S

Poemo

Por la vivo mi ne volas

Por la vivo mi ne volas
insulojn, palacojn, turojn.
Kiel pleja ĝojo alta:
la vivo en la pronomoj!
—
Ekdemetu jam la vestojn
la signojn kaj portretojn;
mi ne tiel volas vin,
vestita en aliulon,
de io ĉiam filin'.
Vol' pri vi: libera, pura,
en neredukteblo: vi.
Mi scias: kiam alvokos
mi vin inter ĉiuj gentoj
de la mondo,
ja nure vi estos vi.
Kaj onte al la demando
pri la alvokant-idento,
jen kiu vin lia volas,

mi enterigos la nomojn,
la surskribojn, historion.
Mi rompanta estos ĉion
kion al mi surĝetita
eĉ antaŭ ol la naskiĝ'.
Kaj denove nekonato
eterna de senvestiĝo,
de la petro, de la mondo,
al vi dir':
"Mi vin amas, kaj jen mi".

Pedro Salinas
(1933)

Tradukis el la hispana **Enric Baltasar** (2015)

Ŝercoj!



-- Terure, mia kara! Ŝia psikiatro malkovris,
ke ŝi enamiĝis al sia patro!
-- Ĉu tamen kuraceble?
-- Nenia espero: ŝia patro estas jam edziĝita.


Nia nova projekto: EKPAROLU!

Kategorio: Edukado; Dato: 2016-01-19 13:56:41

Ni informas vin ke en la jaro 2016 edukado.net komencos grandan, novan projekton, kiun ni nomis EKPAROLU!

Celo de la projekto:

- Doni eblon al la ĵuslernintoj de Esperanto parole apliki la lingvon, ensociiĝi kaj informi ilin pri la programoj, kursoj kaj pluaj ebloj de studoj
- Vaste eluzi la liberajn fortojn de la movadanoj partopreni en la plua edukado de komencintoj
- Fortigi la lokajn klubojn kaj la movadon



Baza ideo

Ene de edukado.net ni kreas surfacon, kie la du flankoj, nome NEVOJ – (komencintoj) kaj ONKLOJ (speciale trejnitaj esperantistoj) trovas unu la aliajn kaj helpe de skajpa kontaktiĝo pasigas kune parolsesiojn.

(Kompreneble sub la nomo ONKLOJ kaj NEVOJ ni komprenas ankaŭ onklineojn kaj nevineojn.)

Ni nombros la sesiojn ambaŭflanke.

La NEVOJ devus anonci sian intencon uzi la servon. Ni akceptos tiujn, kiuj estas je A2-nivelo, aŭ finis la arbon de DUOLINGO, konas la bazon de la gramatiko kaj konas minimume 300 vortojn. Enirinte la programon ili ricevos rajton je 20 (aŭ 30) sesioj de 20 minutoj (decidota) por ekzerci sin en la parolata lingvo.

Ili povos elekti kion ili volas ekzerci: prononcadon, paroladon laŭ difinitaj temoj, aŭ liberan konversacion, ekzerci sin pri konkretaj gramatikaĵoj aŭ korektigi kelkfoje skribaĵojn.

La ONKLOJ estos spertaj esperantistoj, sed ne nepre instruistoj. Ilia tasko estos la paroligo de komencintoj.

La onkloj havu minimume B2-nivelon (prefere kun KER-atestilo). Ili ricevos formadon pri uzo de retroprogramoj, ekzemple skajpo.

Edukado.net disponigas mallongan manlibron pri la strukturo kaj ĉefaj reguloj de sukcesa paroliga sesio kaj por ĉiu temo, kiun la nevoj povos elekti ni donos unupaĝan resumon, helpon al la onklo.

La onkloj faros sian agadon senpage, sed la plej aktivaj ricevos premiojn.

Kiam NEVO eniras la reton, li tuj povas lanĉi serĉadon pri paroligeblo, laŭ temo, tempo aŭ serĉi konkretan onklon, aŭ alian laŭ la nacia lingvo, en kiu li volas esti helpata.

Kion ni esperas, kion eblus atingi?

La programo ebligas al ordinaraj esperantistoj, ankaŭ por nevojaĝemaj aŭ malhelpataj finance aŭ fizike en movoj, ke ili partoprenu en la movado, sentu sin utilaj. Ni havas multajn neuzitajn fortojn, kiujn ni povas tiel aktivigi.

Kio farendas nun?

- La multe pli detala priskribo de la projekto jam ekzistas.
- La estraro de la Fondaĵo edukado.net aprobis ĝin, subtenas, kaj komenciĝis traktado kun la programistoj.
- Ni serĉas bonan logotipon kaj trafikajn grafikaĵojn por la diversaj partoj de la koncerna programo. (Alvoko disiros baldaŭ).
- Necesas trovi ankaŭ financajn subtenantojn.
- Sed la plej grava afero estas nun, ke paralele kun la programista laboro ni jam enketu pri tio, kiuj pretos esti la unuaj onkloj kaj onklineoj, kiuj pretos kunpensadi, perfektigi kaj poste testi la programon, kaj eventuale helpi en la plua formado de aliaj onkloj.

Interesiĝantoj kontaktu Katalin Kovats, kiu kreas por la geonkloj apartan forumon kaj gvidas ilin en la unuaj paŝoj. ■



Tekrar merhaba,

Dergimizin yayına geçmesi ile birlikte başlattığımız kursun 3. dersi ile devam ediyoruz.

Kursumuz çok basit bir kitap olan Avustralyalı G.Gladstone Solomon'un "Esperanto por infanoj" adlı 1934 basımı çok eski bir kitaptan ve geçen ay her dergiye bu kitaptan bir iki ders koyacağız demiştik. Bu derslerin sonuna ekler, sözlük ve dilbilgisi ile ilgili tanımları vereceğimizi de söylemiştik. Bir de eski dergilerinizi atmayın çünkü bu dilbilgisi tanımlarını ya da açıklamalarını bir kere vereceğiz, sonraki derslerde bunları bildiğinizi varsayacağız demiştik.

Hatılıyorsanız konu içindeki tirelerin ("-") kelime ön ve arka eklerini gözle görülebilecek şekilde ayırmak için olduğunu, ayrıca birleşik kelimelerin esas kelimelerini gözle ayrıştırabilmek için olduğunu söylemiştik.

Eski dergilerinizi atmayın çünkü önceki açıklamaları her derste tekrar etmeyeceğiz. Aklınıza takılan bir şey olduğunda önceki sayılara dönüp yaptığımız açıklamaları hatırlamaya çalışın. ■

İşte dersimiz geliyor....

Leciono 3 - LA MANĜO-ĈAMBRO

En la dom-o de Sinjoro Muso est-as manĝo-ĉambro.

La mus-oj manĝ-as en la manĝo-ĉambro.

Ili hav-as tri manĝ-ojn ĉiu-tag-e.

En la manĝo-ĉambro est-as unu tabl-o kaj kvin seĝ-oj.

Sur la tabl-o est-as tri teler-oj, tri tas-oj kaj sub-tasoj, kaj du kruĉ-oj.

Unu tas-o kaj unu teler-o est-as por la patr-o.

Unu tas-o kaj unu teler-o est-as por la patr-in-o.

Unu tas-o kaj unu teler-o est-as por la tri infan-oj.

Sur la tabl-o est-as ankaŭ pan-o kaj buter-o.

La mus-oj manĝ-as la pan-on kaj la buter-on.

Ili trink-as lakt-on kaj akv-on.

La bovin-o don-as al ili lakt-on, du-foje ĉiu-tag-e.

Ili trov-as la akv-on en la river-o.

Sinjorino Muso far-as la buter-on. Ŝi far-as ĝin el la krem-o de la lakt-o.

Ŝi far-as ankaŭ la pan-on. Ŝi far-as ĝin el la gren-o.





La lakt-o est-as en la grand-a kruĉ-o.

La akv-o est-as en la mal-granda kruĉ-o.

La mus-oj sid-as ĉe la tabl-o. (Du infan-oj sid-as sur la tabl-o!!)

La kat-ino kaj la kat-id-o sid-as sub la tabl-o.

Ne est-as patr-a kat-o en la ĉambr-o.



Ekler Açıklama

- e zarf formu ekidir. Zarflar fiilleri tanımlar. Örnek "Ili havas tri manĝojn ĈIUTAG-e" yani "Onlar HER GÜN üç kez yemek yiyorlar". Ne sıklıkla üç öğün yemek yiyorlar? Cevap "HER GÜN"
- id- Kelimeye yavru anlamını verir ("kat-id-o" kedi yavrusu)

Kelime Açıklama

akv-o	su
arb-o	ağaç
bov-in-o	inek (-in eki kelimenin dişi formunu oluşturur)
bov-o	öküz
buter-o	tereyağ
ĉe	-de, -da formu ("La musoj sidas ĉe la tablo" yani "fareler masaDA oturuyorlar")
ĉiu	her (ĉiuj = hepsi)
ĉiu-tag-e	hergün (cümledeki fiili tanımlayan zarf formu)
don-as	verir, veriyor ("don-i" vermek fiilinin şimdiki zaman formu)
du-foj-e	iki kere (cümledeki fiili tanımlayan zarf formu)
el	-den, -dan formu ("ŝi faras ĝin el greno" yani "o, onu buğdayDAN yapar")
far-as	yapar, yapıyor ("far-i" yapmak fiilinin şimdiki zaman formu)
foj-o	kez, kere
ĝi-n	onu ("ĝi" yani nötr üçüncü şahıs zamirinin akuzatifli şekli)
grand-a	büyük
gren-o	buğday
kruĉ-o	sürahi
lakt-o	süt
lun-o	ay
mal-grand-a	küçük (büyük kelimesinin tersi)
pan-o	ekmek
patr-a kat-o	baba kedi
patr-in-o	anne (-in eki kelimenin dişi formunu oluşturur)
plank-o	döşeme, taban, yer (oda ile ilgili bir kelime)
river-o	nehir
seĝ-o	sandalye (okunuşu "seco")
sid-as	oturur, oturuyor ("sid-i" oturmak fiilinin şimdiki zamanı)
skatol-o	kutu
sun-o	güneş
sur	üzeri, üzerinde ("Du musoj sidas sur la tablo" yani "iki fare masanın üzerinde oturuyorlar")
tag-o	gün

NOT

Hatırlayamadığınız kelime ve ekler varsa, anlamları ve kullanımları için lütfen önceki sayılardaki derslere bakın.

Brita Esperanto Kongreso



La Brita Kongreso de Esperanto okazos de la 18a ĝis la 20a de marto, 2016 ĉe Gateway Center, Liverpolo.

<http://www.britakongreso.org>

Dum la kongreso spekteblos diversajn paroladojn kaj prezentadojn, kaj la kongresejo troviĝas nur tri minutojn for de la stacidomo Liverpool Lime Street. La ĉefpreleganto estos ĵurnalisto kaj premiita aŭtoro, kiu vojaĝos de sia hejmo en Svedio por kunveni kun ni.



Kapanış !

Evet, üçüncü sayıya da geldik, mart ayındayız, zaman ne kadar çabuk geçiyor, daha dün yılbaşı idi ve dergimizin ilk sayısını sizlere göndermiştik. Unutmayın eski sayılar web sayfamızın "Dergi" menüsü altındaki linklerden indirilebilir: <http://esperantoturkiye.wordpress.com/>

Bu sayıda yeni bir rekor kırdık: 24 sayfaya ulaştık. İçerik varsa sayfa sayısı hiç sorun değil. İçerik basit ancak bu da basit bir dergi. Amaç Türkiye'de Esperanto dilini öğrenmek isteyenleri bir arada tutmak, onlara okuyabilecekleri "nispeten" basit metinler sunmak.

İlk iki sayımıza içindekiler tablosu koymayı unuttuk! Belki de dergimiz basit olacak, buna lüzüm kalmayacak düşünmüş olabiliriz. Kim bilir. Bu sayıdan itibaren içindekiler tablosu da olacak. Yıl sonunda 12. sayıyı görebilirsek eğer, tüm yılı içeren bir indeks de hazırlayabiliriz.

Bu sayımızda iki yeni köşe açtık. Birisi "Portre" köşesi. Elimizden geldiğince bu köşede Esperanto dünyasındaki kişileri tanıtmaya çalışacağız. Bu sayıda japon esperantist Hori Jasuo'yu tanıtmak istedik. Çok önemli ve çok yönlü bir şahsiyet kendisi.

İkinci köşe ise "Konuk yazar köşesi". Bize yazı gönderen önemli kişiler olduğunda yazılarını bu köşede yayınlayacağız. İlk önemli yazıyı değerli **Prof. Renato Corsetti** gönderdi. Fransa'daki bir seminerde Esperanto dilinin yapısı hakkında yaptığı bir sunumdan bir sayfalık özet hazırlamış bizlere. Yazı son derece ilginç. Lütfen bu yazıyı okuyun çünkü Türkçe dilini de yakından ilgilendiriyor. Kelime kelime tercüme ederek anlamaya çalışın.

21 Şubat Ana Dili Günü için UEA'nın hazırladığı metni sizlere iki dilde aktardık, hazırlanan posterleri dergimize koyduk. Bu çok önemli bir gün ve Esperantist'lerin aslında neyi "amaçlamadıklarını" anlatmak için UEA tarafından bir fırsat günü olarak kutlanmaktadır. Okuyunca anlayacaksınız.

Ürgüp'te Nisan ayı başında tertipleyeceğimiz Dokuzuncu Ortadoğu Toplantısının programını verdik. Seminer içinde seminer olacak bu toplantı çünkü programa açık oturum şekline benzer şekilde yapılacak olan AMO-23 semineri de eklendi. Program yoğun olacak. Katılanlara hem ilginç gelecek hem de dillerini geliştirmede katkısı olacaktır. Yabancı bir çok esperantist ile buluşma ve konuşma imkanı olacaktır.

Bunların dışında, Temmuz ayında Bulgaristan'da yapılacak bir toplantının tanıtımını da yaptık. Programı gönderenlerin ricası üzerine bunu da dergimize ekledik. "Kısa Felsefe Tarihi" serisinin ikinci kısmı olan filozof Eflatun hakkında özet bilgi verdik. Amaç felsefe öğrenmek değil, Esperanto dilinde bir şeyler karalamak ve okuyanların da bunu anlamaya çalışması. Esperanto kurumlarından TEJO hakkında özet bilgi verdik. Dr. Barış Yılmaz'dan kısa bir yazı, Konuralp Sunal'ın geçen ay ölen kedisi için yazdığı bir şiiri, bir Fransız esperantist'in gençlik yıllarından bir hikayesini aktardık, bir kitap tanıtımı yaptık, ve basit Esperanto kursumuza üçüncü dersi ile devam ettik.

Yazmadan okumadan bir dili öğrenemezsiniz. Lütfen okuyun, karalayın, hatta bize gönderin. Okuyucu mektupları da bekliyoruz. Bunlar Türkçe dilinde de olabilir, sizinle birlikte Esperanto'ya da çevirebiliriz. ■

Lütfen "ESPERANTO TÜRKİYE" grubumuza katılın:

<https://www.facebook.com/groups/7121509722/>

Yazılarımızı facebook grubumuzdan ya da vasilkadifeli@gmail.com adresine gönderiniz.

Dergiye ücretsiz abone olmak için bize e-posta adresinizi gönderin.

Sonraki sayıda buluşmak üzere...

Umberto Eco (1932-2016)

En la 19-a de februaro mortis Umberto Eco, la fama itala verkisto, profesoro kaj intelektulo. Li naskiĝis en la 5-a de januaro 1932 en Alessandria. Poste li laboris kiel profesoro pri semiotiko en la universitato de Bolonjo.


Umberto Eco multe interesiĝis pri komunikado, idiomoj kaj artefaritaj lingvoj. En diversaj libroj kaj artikoloj pritraktis tiajn temojn. Menciindas tiuflanke la jena libro: "La ricerca della lingua perfetta nella cultura europea" (tradukita al Esperanto per la nomo: "La serĉado de la perfekta lingvo en la eŭropa kulturo", 1993)

Listo de liaj famaj verkoj:

- * Opera Aperta (1962)
- * Trattato di semiotica generale (1975)
- * Il nome della rosa ("La nomo de la rozo", 1980)
- * Il pendolo di Foucault (1988)
- * La ricerca della lingua perfetta nella cultura europea ("La serĉado de la perfekta lingvo en la eŭropa kulturo", 1993)
- * L'isola del giorno prima ("La insulo de la antaŭa tago", 1994)
- * Baudolino (2000)


Multaj el liaj verkoj estis ankaŭ tradukitaj al turka lingvo.

En la numero februaro 1993 de la revuo "Esperanto" estis artikolo pri intervjuo de Umberto Eco fare de István Ertl kaj François Lo Jacomo : "Esperanto povas fariĝi la Hongkongo de la lingvoj" (p. 21, 22, 23, 24).



Ni publikigas tiujn paĝojn kiel aldonaĵo en la fino de nia revueto esperante ke ĝi estos legebla.

Bonan legadon...



Intervjuo kun Umberto Eco:

Esperanto povas fariĝi la Honkongo de lingvoj

En 1992 la fama verkisto Umberto Eco estis invitita kiel tria eksterlanda profesoro al la Pariza Collège de France, scienca instituto kies prelegoj estas publikaj. Lia kursaro, daŭrinta de oktobro 1992 ĝis januaro 1993, portis la titolon La serĉo de perfekta lingvo. Li pritraktis unuavice la historion de la lingvo-filozofia ideo ke la naturaj lingvoj estas malperfektaj, kaj ke por filozofiaj celoj logike perfekta lingvo estas ellaborenda. Tamen, li ripete aludis ankaŭ al Esperanto, kaj la kursojn de la 17-a kaj 18-a de decembro li dediĉis i.a. al nia lingvo.

Liaj diversaj eldiroj kompreneble vekis la intereson de la Esperanto-gazetaro, kaj plurloke aperis artikoloj pri lia opinio koncerne Esperanton (i.a. en ĉi tiu revuo: dec., p.201). Por ekkoni la aŭtentan vidpunkton de Umberto Eco, François Lo Jacomo kaj István Ertl petis de li intervjuon, kiu realiĝis la 20-an de januaro en la Pariza loĝejo de Eco. Ni publikigas ĉi-sube tiujn partojn de la interparolo kiuj proksime rilatas al Esperanto.

ECO: La demando ĉu eblas traduki inter la lingvoj estas tre malnova filozofia problemo, sed ĝis nun oni traktis ĝin en sufiĉe malpreciza maniero. Nuntempe okazas la unuan fojon en la historio ke oni okupiĝas serioze pri tiu ĉi demando.

Mi pensas ke ĉi tiu problemo estas fundamente grava por vi, ĉar Esperanto povas ekzisti nur se oni akceptas la principon ke tradukado estas ebla. Se ekzistus perfekta lingvo, ĝi estus la parametro de ĉiu ebla tradukado. Sed, manke de tia parametro, la vehikla lingvo povas ekzisti nur se estas eble traduki el ĉiuj lingvoj en ĉiujn lingvojn. Ŝajne, vehikla lingvo devus elimini tradukadon, sed kontraŭe, tradukado estas la principo mem kiu pravigas la eblecon kaj ekziston de vehiklaj lingvoj.

LO JACOMO: Ĝuste, ekzistas studoj pruvantaj ke esperantistoj ĝenerale scipovas pli da lingvoj ol averaĝa homo, ili do estas ankaŭ pli sentemaj al la problemoj de tradukado.

ECO: Tio ne surprizas min. Kiu lernas duan lingvon, tiu ĉiam estas pli malfermita por lerni iun trian. Mi havas pri tio rektan sperton pro miaj filoj, kiuj estas dulingvaj. Por ili estas tre facile lerni trian lingvon, kiun ili eble poste forgesos, tamen... Ekzistas ia mensa preteco je la multeco de lingvoj.

– Ambaŭ estas burro kaj Butter kune.

Mi povis do konstati ke por li ne ekzistas iu dividiĝo de la realo.

Se oni denaske scias ke objektoj povas havi du nomojn, tio mense preparas al la ebleco ke ekzistas eĉ tria nomo. Ankoraŭ malmulto estas konata pri dulingveco, sed nuntempe, kiam la internaciaj geedziĝoj fariĝas io tute normala en la eŭropa socio, ni havos eble pli bonajn studojn pri la temo.

ERTL: Ĉe la Universitato La Sapienza, en Romo, prepariĝas eksperimento kun dudeko da gravedulinoj naskontaj infanojn el kies du lingvoj unu estos Esperanto.



Eco: "Ĝis antaŭ ses monatoj mi fajfis pri Esperanto." (dekstre, I. Ertl)

ERTL: Ĉu vi opinias ke temas prefere pri mensa preteco, ne nur pri propedeŭtika efiko de la jam lernitaj lingvoj?

ECO: Foje mi faris eksperimenton. Iun matenon mi montris al mia filo pecon da butero kaj demandis lin:

– Kio estas tio?

– Burro (butero).

– Sed ĉu ĝi ne estas ankaŭ Butter?

– Jes – li diris –, ĝi estas ankaŭ Butter.

Mi disduigis la pecon kaj demandis:

– Kiu el la du estas la burro kaj kiu la Butter?

ECO: Ĉu? Tamen, ĉia formo de Esperanta dulingveco ŝovos Esperanton al minoritata pozicio, ĉar surstrate oni parolas la lingvon de la ĉirkaŭaĵo. Nome, la mito de gepatra lingvo estas malprava: la infanoj identiĝas ne kun la patrina lingvo, sed kun la lingvo de la domzorgantino...

Miaj filoj en Italio lernis la germanan de sia patrino, sed la lingvo kiun ili uzas inter si estas la itala.

LO JACOMO: Lingvoj ĉiam respondas al iu komunik-bezono. Oni rifuzas lingvon se ĝi uziĝas en komunika situacio kiun oni ne deziras.

Iu kiu fartas bone en la strata medio, aŭtomate alprenos la lingvon de la strato, kaj se oni havas konflikton kun siaj gepatroj, oni rifuzos la gepatran lingvon ... temas pri klasikaj situacioj.

Preter la pure lingvistika aspekto, oni konsideru ankaŭ la sentojn ligitajn al lingvo. El ĉi tiu vidpunkto Esperanto ŝajnas malsama ol aliaj lingvoj. Kutime, lernado de iu lingvo signifas provon integriĝi en la grupo kiu ĝin parolas, dum per Esperanto homoj provas ĝuste eskapi el la grupo kiu formas ilian naturan medion.

ECO: Sed, aliflanke, oni certe povas esti afekcie ligita al la Esperanta komunumo. En la vivo ofte kreiĝas specialaj situacioj afekciaj: mi daŭre parolas france kun tiuj usonaj amikoj kun kiuj ni unufoje parolis la francan.

Dum unu el miaj prelegoj mi ŝercis dirante ke vehiklan lingvon oni ĉiam uzos por publikaj rilatoj, sed oni ne amoros pere de vehikla lingvo. Tiam mi ricevis iom embarasan letereton de studentino: "Sinjoro, vi malpravas. Tre bone eblas amori en la lingvo Esperanto. Mi faras tion." Mi ne scias ĉu temas pri propono ...

Jes, se ekzistas afekcia ligo al la Esperanta komunumo, mi povas kompreni se la esperantistoj amoras en Esperanto.

ERTL: Do, iuj homoj estas emocie ligitaj al Esperanto. Sed aliaj eble timas ĝin. Ĉu oni devas timi Esperanton?

ECO: Ne, mi kredas ke neniu timas Esperanton. La ĝenerala sinteno estas senintereso ...

ERTL: Prefere, nescio.

ECO: Jes. Prenu min kiel ekzemplon. Ĝis antaŭ ses monatoj mi fajfis pri Esperanto. Vere. Malgraŭ ke mi

estas ekzemplo de klera homo kun multe da scivolo. Necesis ke mi eklaboru pri "La serĉado de perfekta lingvo", la temo de miaj prelegoj ĉe Collège de France, por veni al la internaciaj lingvoj.



"Ni vivas en historia momento kiam estas pli facile akceptigi eĉ lingvon artefaritan."

Komence mi opiniis ke estas neeble igi artefaritan lingvon uzata, ĉar la historio demonstris la neeblecon de tia utopio. Mia alia objekto originis el la idearo de Whorf, laŭ kiu ĉiu lingvo estas ankaŭ aparta mondkoncepto. Neniu lingvo povas esti neŭtrala, ĉar la mondkoncepto kiun ĝi trudas konfrontiĝas kun la mondkonceptoj truditaj de aliaj lingvoj.

Sed mi devas diri ke tuj kiam pro sciencaj kaŭzoj mi iomete ekokupiĝis pri Esperanto, mi ŝanĝis mian starpunkton kaj alprenis pli flekseblan sintenon.

Tio ke en la historio oni neniam sukcesis uzigi artefaritan lingvon, estas argumento certe tre forta, sed ne decide grava. Tute same oni demonstris ke ne eblas suriri la Lunon! La principo ke ne eblas uzigi

artefaritan lingvon estis valida ĝis hieraŭ, sed morgaŭ la situacio povos ŝanĝiĝi. Vidu Albanion: ene de unu generacio la italoj senvole instruis la italan al la albanoj, simple ĉar tiuj estis elmetitaj ĉiuvespere al itala

televido. La hodiaŭaj junuloj parolas pli-malpli bone la anglan pro la potenco de la amas-informiloj. Ni vivas en historia momento kiam estas pli facile akceptigi lingvojn, eĉ lingvon artefaritan.

Cetere, la artefariteco de Esperanto ne estas malavantaĝo. Antaŭ ol havi pli klarajn ideojn pri Esperanto, ankaŭ min ĝenis ĝia artefariteco. Sed, fakte, se mi ne scius ke temas pri artefarita lingvo, mi povintus kredi ĝin natura.

La egoismo de la registaroj

La alia argumento kiu validis kontraŭ ĉiu internacia lingvo, citita ekde la filozofo Fontenelle, estis pri la egoismo de registaroj, kiuj ne havas intereson subteni internacian lingvon, ĉar ili ja preferas disvastigi sian propran. Nu, hodiaŭ ĝuste la egoismo de la registaroj povus instigi ilin apogi Esperanton. Kial?

Mi vidas kio okazas nuntempe en Francio: oni daŭre parolas pri la danĝereco de la angla, sed la fantomo kiu efektive obsedas la francojn estas la germana. Baldaŭ ili estos pretaj subteni vehiklan lingvon, nur por malhelpi la plifortiĝon de alia lingvo. Ekde tiam la rezisto de instancoj povus malaperi.

Restas al mi unu grava objekto. Nome ke ĉiu parolata lingvo spertas

Ekde kiam lia romano La nomo de la rozo aperis sur la librobretoj (1980) kaj ĝia filmvarianto konkeris la kinejojn, Umberto Eco estas inter la plej furoraj aŭtoroj de la mondo. Ankaŭ lia dua romano, La pendolo de Foucault (1988), triumfis en la libroj. Sed Eco estas multe pli ol romanisto. Kunfondinto de la signoscienco nomata semiotiko, li posedas la raran kapablon samtempe disvolvi sciancan vivoverkon kaj apliki ties rezultojn al ĉiutagaj fenomenoj en maniero komprenebla por ordinario: li verkis eseojn pri futbalo, Usono, popularaj filmoj ... kaj regule kontribuas al gazetoj. Lastatempe li estis elektita en la 21-membran "konsilion de saĝuloj" de Unesko, kies tasko estas proponi ideojn al la venonta Ĝenerala Konferenco de la kultura mondorganizaĵo pri la rolo de Unesko fine de tiu ĉi jarmilo.

ŝanĝigon, do se internacia lingvo disvastiĝas, ĝi riskas ŝanĝiĝi – aŭ male, fariĝi tro kontrolata, kiel la klasika franca . . .

Tiu estas baza kontraŭdiro, sed, manke de historia sperto, oni ne povas aserti ion pri tio. Necesos ke dek milionoj da japanoj ekparolu Esperanton por povi juĝi ĉu la japana Esperanto fariĝas dialekto aŭ ne.

ERTL: Sed ĝuste pri tio ekzistas la tezo de François Lo Jacomo, *Libereco aŭ aŭtoritato en la evoluo de Esperanto*, kiu priskribas la du polusojn de evoluo.

ECO: Jes, sed la problemo povos ŝanĝiĝi radikale, neantaŭvideble, ekde kiam vi havos miliardon anstataŭ miliono . . .

ERTL: Kiel vi diris, malantaŭ ĉiu lingvo estas iu mondkoncepto. Ĉu, laŭ via opinio, tio validas ankaŭ pri Esperanto? Ĉu ĝi ne estas prefere, laŭ sia naturo, renkontiĝejo de diversaj mondkonceptoj, vojkruciĝo de komunikado?

ECO: Mi ne kapablas respondi al vi, ĉar mi ne parolas Esperanton, kvankam mi studis ĝian gramatikon. Kiel kaj kiom iu lingvo formas vian mondkoncepton, tion vi konstatos nur dum la lernado de tiu lingvo.

Principe mi povus akcepti ke mik-sita lingvo, kiu prenis leksikajn kaj sintaksajn strukturojn el diversaj lingvoj, povas redukti la apartaĵojn de la fontolingvaj mondkonceptoj. Sed, se temas pri serioza lingvo (mi celas: pri aŭtonoma lingvo-universo), tiam mi supozas ke ĝi iamaniere ja trudas iun mondkoncepton.

Tamen ne necesas troigi pri la Whorf-a elemento. Ni ĝissate aŭdis la historion pri la eskimoj kiuj havas kvar vortojn por *neĝo*. Nu, se vi klarigas al eskimo ke por vi temas pri la sama neĝo, li tre bone komprenos. Jes, la lingvo difinas la pensadon, sed ĝi provizas ankaŭ la translingvan eblon de daŭra eliro el la lingvo. Probable, 80-90% de tiuj kiuj konas *Milito kaj paco* de Tolstoj, legis ĝin en traduko. Malgraŭ tio, ĝi inspiros al legantoj japana kaj sveda tre similajn ideojn kaj reagojn.

Tio ne respondas al via demando . . .

ERTL: Plue el teoria vidpunkto, ĉu vi konsentas ke internacia lingvo ideale devus esti neŭtrala renkon-

La 27-an de januaro 1993
forpasis en sia hejmo (La Laguna)

Juan Régulo Pérez

vartanto kaj kreanto de la Esperanta kulturo.
Nia marta numero honoros lian memoron.

tiĝejo, taŭga por interpreti diversajn mondkonceptojn?

ECO: Jes, tio ŝajnas al mi praktike ebla. Kvankam mi insistas ke ĉiu lingvo, do ankaŭ Esperanto, reprezentas propran mondkoncepton, mi opinias ankaŭ ke ĝi povas fariĝi vojkruciĝo, iaspeca Honkongo de lingvoj. Por urboj same kiel por lingvoj, estas normale ke la ofteco de internaciaj rilatoj estigas grandan eblon de kontaktoj kun diversaj kulturoj.

LO JACOMO: Dum lingvoj kutime altrudas iun mondkoncepton, mi demandas min ĉu en la kazo de Esperanto ne estas la mondkoncepto kiu instigas lerni la lingvon.

La Esperanta "religio"

ECO: Ĝuste, tio estas unu el miaj malkovroj en la pasintaj ses monatoj. Mi devas rekoni ke, kompare kun aliaj projektoj de internacia lingvo, malantaŭ Esperanto staras iu ideologio, kio klarigas kial ĝi eltenis dum la aliaj fiaskis. Ekzistas Esperanta "religio", kiu igas homojn lerni kaj paroli la lingvon, dum ne ekzistas "religio" de Volapük aŭ de Ido. La anglan oni lernas nuntempe pro praktikaj kaŭzoj. Sed povas ekzisti ideoj instigoj kiuj decidigas lerni lingvon, kaj ili estas fortaj.

LO JACOMO: Esperanto estas rigardebla je pluraj niveloj: unue, kiel projekto; due, kiel lingvo kiu trapasis la projekto-fazon kaj evoluadis; fine, eblas konsideri ĉion sociologie kaj psikologie ligitan al Esperanto, tion, kio povas nomiĝi la *fenomeno* Esperanto. Kiu el tiuj aspektoj plej interesas vin?

ECO: Estas iom malfacile por mi respondi. Esperanto povus iam interesi min kiel lingva mekanismo. Sed ĝis nun mi ne faris tiun laboron sufiĉe. Ni diru ke ĉefe ĝiaj historio kaj ideologio ŝajnas al mi interesaj fenomenoj: tiuj estas ĝia nekonata

flanko. La homoj perceptas Esperanton ĉiam nur kiel proponatan ilon. Ili konas nenion el la idealisma elano kiu animas ĝin. Tamen, mi estis ĉarmita de la biografio de Zamenhof, ne de la gramatiko de Migliorini. Vi devus pli konigi tiun aspekton! Kial oni neniam faris filmon pri Zamenhof? La historia-ideologia flanko de Esperanto restas absolute nekonata.

ERTL: Sed necesas diri ankaŭ ke ne nepre iu ideologio igas homojn esperantistoj. Nian identecon konstituas pluraj faktoroj, ne ĉiuj retroveblaj ĉe ĉiu esperantisto.

ECO: Mi uzis la vorton *ideologio* en tre larĝa senco: aro de ideoj, de opinioj . . . Mi celis prefere ion kion angloj kaj usonanoj nomas *philosophy*, la *filozofio* de iu entrepreno, aŭ de skolta asocio . . . Do, iu ĝenerala orientiĝo. Sen tio, vi ekzemple ne havus ĉiujn viajn revuojn – ekzistus nur komerco de gramatikoj, kaj finite. Eĉ la ideo traduki ĉiujn verkojn de la mondliteraturo estas ideologia, ne utileca. Kiom mi povis konstati, ofte temas pri duarangaj aŭtoroj. Mi vidis ke oni tradukis Giacosa aŭ De Amicis,* kaj ne diru al mi ke la mondo bezonis ilin . . .

LO JACOMO: Ĉar la esperantistoj uzas sian lingvon por konigi sian identecon al la tuta mondo, aktive. Ĉiu tradukas verkojn kiujn li mem opinias gravaj. Estas maniero de sinesprimado.

ECO: Vi rivelis al mi ion tre interresan . . . kaj tre ideologian! Do, oni tradukas Giacosa kaj De Amicis ne nur por montri ke la lingvo estas kapabla traduki ĉion, sed ĉar oni devas doni al ĉiuj la eblon paroli. Tio estas filozofia. Bedaŭrinde, nur esperantistoj profitas el tio.


*Giuseppe Giacosa (1847-1906) kaj Edmondo de Amicis (1846-1908): italaj verkistoj, popularaj en sia epoko. Nun oni pli vaste legas nur la porinfanan *Koro de Amicis* (esperantlingve: 1936).

ERTL: En kelkaj kazoj, tamen, Esperanta traduko servis kiel ponto por, ekzemple, ĉinaj tradukoj. Cetere, la fakto ke oni multe tradukas el sia propra lingvo en Esperanton estas tre interesa esplor-temo. Tial ke la normoj de Esperanto estas malpli rigidaj ol tiuj de aliaj lingvoj, kaj ĝi estas pli supla, en la manoj de bona tradukisto ĝi pli facile rekreas la stilon de la originalo.

ECO: Sed diru al mi, se mi legas Esperantan tekston pensitan en alia lingvo, ĉu ĝi ne impresas min kiel malbone verkita?

ERTL: Tio dependas precipe de la kapabloj de la tradukisto – kaj, pli ĝenerale, de la sociolingvistika distribuado de la esperantistoj. Iuj uzas bonan stilon, aliajn pli influas la skemoj de ilia propra lingvo.

LO JACO: La lingva toleremo ludas gravan rolon en Esperanto. Mi dirus ke ekzistas diversaj niveloj de kompreno, de lingva ĝustemo. Evidente, ju pli alta estas la nivelo, des pli oni konscias pri subtilaĵoj, des pli zorge oni esprimas sin. Mi ne scias kion vi pensas pri tio . . .



“Esperanto reprezentas proprajn mondkoncepton kaj ideologion.”

ECO: Mi ekscias novajn aferojn. Estas interesa intervjuo, en kiu la intervjuato havas tre malmulton por diri.

ERTL: Fariĝos malbona intervjuo.

ECO: Sed ĝi estis tre interesa dialogo. Ekzemple, mi neniam pripensis

la stilajn diferencojn, aŭ la gradojn de tolero pri kiuj vi parolis.

Vi ja sciis, kiam vi venis al mi, ke vi ne povas atendi mirindajn revelaciojn de homo kiu ne parolas Esperanton. ★

Praktika aplikado:

Ĉu ĉinoj komercu per Esperanto?

Mi legis la optimismigan raporton “Ĉinoj komercas per Esperanto” en la oktobra (1991) numero de *Esperanto*. Aliflanke, Laŭlum skribis antaŭ nelonge (jul-aŭg. 1992): “Ni . . . tro malmulte atentis pri praktika uzado [de Esperanto] . . . en internacia komerco.” Mi tute konsentas kun li.

En mia universitato, kiam mi komencis propagandi Esperanton antaŭ dek jaroj, estis nek unu profesoro nek unu lernanto de la japana lingvo. Multaj studentoj elektis Esperanton kiel duan fremdan lingvon. Nun eĉ en iu urbeto, kie antaŭ unu jaro neniu sciis kio estas fremda lingvo, funkcias kursoj de la japana kaj korea lingvoj, ĉar tiu gubernio estis ĵus elektita por iĝi pordmalferma regiono por la investoj kaj entreprenoj de koreaj komercistoj.

La homoj kiuj eklernas la lingvojn de fremdaj komercistoj, eĉ senpage ne volus lerni Esperanton, kaj sekvas ne nian idealon de amikeco kaj paco sed la idealon per ĉiu rimedo riĉigi sin kaj fortigi nian landon. Ili lernas Esperanton nur se la investoj kaj la enkonduko de novaj teknikoj okazus per nia lingvo. Eĉ miaj universitataj E-lernantoj, kiam mi demandas ilin ĉu Esperanto estas bona kaj utila, respondas unuanime ke Esperanto estas ĉiuflanke bona, sed pri la utileco ili hezitas, ĉar “oni ne povas komerci per Esperanto”. Ĉu ili pravas?

Iuj diras ke Esperanto jam multe utilas en turismo. Mi mem, kiel delegito de UEA, kun miaj kolegoj entuziasme helpis vojaĝantojn. Bedaŭrige iuj el ili konis nur kelkajn Esperantajn vortojn por peti nian varman akceptadon. Por ili Espe-

ranto estis tre utila, ĉar ili povis ĝui per ĝi bonon kaj gajnon. Sed bonvolu imagi: kiom da ĉinoj povas vojaĝi per Esperanto?

Tamen: la lastsomeran 5-an Pacifikan Kongreson en Qingdao, kie mi partoprenis, povis ĉeesti centoj da junuloj, kiuj gajnas ĉ. 50 dolarojn monate, kaj do ne facile pagus 20 dolarojn nur por la aliĝkoto. Sed subtenis ilin fabrikoj kiuj volis allogi investojn de fremdaj komercistoj. Eble iuj esperantistoj malĝojis ke tiuj junuloj prezentis produktojn de fabrikoj, invitante eksterlandanojn viziti kaj investi. Tamen, ĉu alimaniere ili povus havi okazon por utiligi sian Esperanton en internacia renkontiĝo?

Ĉu do ĉinoj komercu per Esperanto?

Liu Xiaojun (Ĉinio)